

G. Valente

FOTOGRAFIA FAKVORTARO
kun
perdiskede
anglaj kaj italaj ekvivalentoj

T. E. A.
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
1997

G. Valente

FOTOGRAFIA VORTARO
kun
perdiskede
anglaj kaj italaj ekvivalentoj

VOCABOLARIO TECNICO DI FOTOGRAFIA
con
i termini corrispondenti inglesi ed italiani
su floppy disc

TECHNICAL PHOTOGRAPHY DICTIONARY
with
english and italian equivalent terms
on floppy disc

T. E. A.
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
1997

© 1997, T.E.A. TRIESTA ESPERANTO ASOCIO,
via Crispi 43, IT-34125 Trieste

Finpresado:
junio 1997

ANTAŬPAROLO

Ĉiam pli ofte evidentiĝas lastatempe la problemo de manko de fakterminoj en Esperanto.

Dum pli ol cent jaroj de sia historio, la lingvo internacia, per la fortoj de unuopaj pioniroj, postkuris la progresantan teknologion, kiu samtempe daŭre akcelis sian iron.

Fine de la pasinta jarcento grandaj esperoj akompanis la progresadon de l' homaro kaj ĝuste inter tiuj esperoj troviĝis ankaŭ Esperanto. Laŭvoje de la nuna jarcento, teknologio kaj scienco preskaŭ freneze galopis – ĝis la konkero de la Luno, ĝis la superregado de la komputoro – kaj konsekvence tiu "galopado" bezonis ĉiam pli novajn vortojn: naskiĝis lavango da términoj, eroj de la nova scienco–teknologia komunikado.

La unuaj pioniroj konstruantaj la "domon" Esperanto, ja zorgis pri la "brikoj", sin dediĉante tamen pli al solvo de gramatikaj problemoj ol al serĉado kaj elekto de fakaj terminoj.

Ekzistas tamen pluraj fakterminaroj: SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO, publikigita de Japana Esperanto–Instituto en 1956, mencias 37 verkojn pritraktantaj multajn fakojn, de arkitekturo ĝis zoologio. Sed pri medicino, ekzemple, aperis nur MEDICINA VORTARO en la jaro 1932! Nuntempe fare de d-ro Saburō Yamazoe (Japanio) estas en preparo ANGLA-ESPERANTA MEDICINA TERMINARO, jam je dispono ekde litero «A» ĝis litero «H», eldonita de Umea Shinoda Kuracejo, Pollando.

Aliflanke meritas grandan atenton **РЕКОТЕКО – Per-Komputora Termina Kolekto** – rezulto de la agado en Kanado de Rüdiger Eichholz, kiu interalie prizorgis dum 24 jaroj la eldonon en 1988 de la **ESPERANTA BILDVORTARO**, baziĝinta cetere sur la 2-a eldono de **DUDEN–BILDWÖRTER–BUCH DES DEUTSCHEN SPRACHE** en 1956.

La problemo de fakterminoj estis la plej grava temo dum la kunveno okazinta en Prago de la 7-a ĝis la 14-a de julio 1994, laŭ iniciato de André Albault, tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto. Ĉiuj prelegintoj estis elstaraj kompetentuloj pri nia lingvo, inter ili Eli Urbanová, Marie Bartovská, Michel Duc Goninaz, Detlev Blanke, Rüdiger Eichholz, Ian Jackson. El la 14 prelegoj, ok temis pri la fakaj terminoj en Esperanto kaj generale ĉiuj plendis pri manko de terminoj kaj terminaroj en multnombraj fakkampoj. Tio, kompreneble, tre malhelpas la praktikan uzadon de la lingvo precipe en teknikaj sektoroj, kies

evoluo postulas ĉiutagan lingvan ĝisdatiĝon. Tiuj valoraj kontribuajfoj estis kolektitaj, kaj sekvantaj eĉ eldonitaj, far KAVA-PECH en formo de broŝureto: *LA STATO KAJ ESTONTECO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO*. Per tiu verketo, konfirmiĝas la absoluta graveco de kompilado, redaktado, eldonado, ĝisdatigo ktp de fakterminaroj, kiuj certe influas la estontecon de nia lingvo: ni ĉiuj povas helpi – per studado, proponado, diskutado – por forigi tiun mankon. Krome, ĝia redaktoro Peter Chrdle opinias ege grave – kaj pro tio mi tute konsentas kun li – ke ĝenerale tiuj fakvortaroj enlistigu la esperantajn terminojn, kune kun la ekvivalentoj en aliaj lingvoj. La tasko, nome pretigi plurlingvan fakvortaron, kompreneble fariĝas konsiderinde pli komplika, ĉar devus kunlabori diverslingvanoj, kompetentaj pri la koncerna fako kaj sekve tuja eldono prokrastiĝas.

Por trovi rimedon kontraŭ tiu malfacilaĵo, jen la aldono al la tiu ĉi vortareto de diskedo kun la ekvivalentoj en la esperanta, angla kaj itala lingvoj. Ĝi havigas tujan tradukon de unu fakvorto en alian lingvon kaj espereble ankaŭ stimulos la esperantistojn doni sian kontribuon provizante al mi la koncernajn fakvortojn en aliaj lingvoj. Tiam eblas facile ĝisdatigi nur la diskedon sen neceso represi la tutan verkon: ĉiu povos anstataŭigi propran diskedon per alia ĝisdatita aŭ eĉ ĝin ĝisdatigi, eble per Internet. Rezulto tute certe interesa kaj – ĝis nun – unika en nia Esperantio.

Multajn dankojn mi ŝuldas al ĉiuj, kiuj kunlaboris kaj helpis naski tiun ĉi verketon. Precipe al s-ino Wera Blanke, zorginta kieran kaj precizan reviziadon eĉ per tute aŭtentikaj lecionoj pri terminara vortfarado. Poste al kara amikino Elda Dörfler, kiu pacience plurfoje korektis kaj poluris la tuton. Ankaŭ la amiko Riccardo Toffoletti, fotisto, estas certe dankinda pro la altvaloraj klarigoj pri pluraj difinoj kaj konceptoj de tiu specifa fako.

Kompreneble, tiu ĉi mia modesta kontribuo al pliampleksigo de la fakterminara sektoro enhavas neeviteblajn difektojn ĉu pro la proponitaj neologismoj, ĉu pro la difinoj mem: tial ĉiam bonvenos kritikoj kaj sugestoj por ties plibonigado.

Mi esprimas nur deziron: povu *FOTOGRAFIA VORTARO* estigi ekfloradon de serio da similaj fakterminaroj.

Giuseppe Valente

Udine, junio 1997

DISKED-ENHAVO

Fajloj por IBM-kongruaj komputoroj:

<i>Microsoft Word 2.0</i> por Vindozo 3.11	<i>angla.do</i> <i>esperanto.do</i> <i>itala.do</i>
<i>Microsoft Word 6.0</i> por Vindozo 3.11	<i>angla.doc</i> <i>esperanto.doc</i> <i>itala.doc</i>

La uzantoj de alitipaj komputoroj k programoj povas prezenti siajn problemoj rekte al la aŭtoro ĉe T.E.A., por trovi kongruan solvon.

Fajloj nomataj *angla.** enhavas unuakolumne, alfabete ordigitajn, la anglajn terminojn kun la respektivaj ekvivalentoj en esperanto k itala.

Fajloj nomataj *esperanto.** enhavas unuakolumne, alfabete ordigitajn, la esperantajn terminojn kun la respektivaj ekvivalentoj en angla k itala.

Fajloj nomataj *itala.** enhavas unuakolumne, alfabete ordigitajn, la italejn terminojn, kun la respektivaj ekvivalentoj en angla k esperanto.

Bonvenaj estos ĉiuj informadikaj sugestoj por plibonigi la aspekton de la tuta prezentado.

BIBLIOGRAFIO

Corbeil J.-C. , Archambault A., *Dizionario visuale italiano-inglese*, ZANICHELLI, Bologna, 1993.

Eicholz R., *Esperanta bildvortaro*, ESPERANTO PRESS, Bailieboro, 1988.

Freeman M., *Il grande manuale della fotografia*, G. MONDADORI, Milano, 1988.

Langford M. J., *Trattato di fotografia moderna*, 2-a eld., 1975

Minnaja C., *Vocabolario italiano-esperanto*, CoEdEs, Milano, 1996.

Ragazzini G., *Dizionario inglese-italiano italiano-inglese*, 2-a eld., ZANICHELLI, Bologna, 1989.

Righini M., *Corso di fotografia*, DE VECCHI, Milano, 1990.

Verks K., *Elementa fotografa optiko*, PRESA ESPERANTISTA SOCIETO, Paris, 1906 (danke al d-ro Detlev Blanke, Berlin)

Waringhien G. (ĉefred.), *Plena ilustrita vortaro kun suplemento*, S.A.T., Paris, 1987.

Zingarelli N., *Vocabolario della lingua italiana*, 11-a eld., ZANICHELLI, Bologna, 1983.

KLARIGOJ

(PIV,586)	rilatas al PLENA ILUSTRITA VORTARO , 1987 (PIV, paĝo)
(PIV/s,19)	rilatas al SUPLEMENTO de PIV , 1987 (PIV/s, paĝo)
(EB,111/55)	rilatas al ESPERANTA BILDVORTARO , 1988 (EB, ilustraĵo/numero)
(M,83)	rilatas al C. Minnaja, VOCABOLARIO ITALIANO-ESPERANTO , 1996 (M, paĝo)
(laŭ PIV,24)	difino kompilita baze de PIV
STEREOSKOPO	resendas al termino en PIV
**	neologismo (nepre klarigenda)
☒	aparta teknika signifo
→ A. KROMATA	resendas al specifa termino en FOTOGRAFIA VORTARO
AUTOCHROME	origina nomo
(OGRAF)	uzebla laŭ propra kriterio
Photogram *	proponata termino ĉe ekvivalentoj

MALLONGIGOJ laŭ PIV

ĉ.	ĉirkaŭ
ekz.	ekzemple
k	kaj
ks	kaj simile, kaj similaj
resp.	respektive
ktp	kaj tiel plu
t.n.	tiel nomata

ABERACIO. Optika difekto de objektivo, limiganta ĝiajn servojn. Jen la ĉefaj aberacioj: →A.KROMATA →A.SFERA-AKSA, →ASTIGMATECO, →DISTORDO, →HARAO, →KAMPA KURBECO.

ABERACIO KROMATA (PIV,586). Lensa difekto konvergiganta diversloken, sur la optika akso, la radiojn malsame ondolongajn, enstantajn en blanka lumradio.

ABERACIO SFERA-AKSA. Konverĝo diversloken de la lumradioj, kaŭzita de la kurba surfaco de lenso.

ADAPTIGO. Kapablo de la homa okulo variigi sian sentivecon laŭ la lumintenso k/aŭ malsamaj perceptitaj koloroj.

ADAPTO-RINGO. Instrumento, kiu ebligas uzi akcesorajojn diametre malsamajn ol la normala objektivo aŭ adapti objektivon al malsamfabrika fotilo. Atentu la →INTERSPACO-n.

ADICIA KOLORSINTEZO. Procedo reproduktanta la kolorojn de objekto per kunmeto de malsamaj kvantoj da →KOLOROJ PRIMARAJ.

ADICIA PRINTADO. Plurfoja eksponado de originalo tra fil-

triloj blua, verda k ruĝa dum →ADICIA KOLORSINTEZO.

AE. Siglo de →AŬTOMATA EKSPONADO.

AE-FERMO. Kontrolsistemo en →AE-FOTILO por enmemorigi specifan eksponmezuron.

AE-FOTILO. F. kapabla aŭtomate reguli →EKSPON-DAŬRO-n per →EKSPONOMETRO ENFOTILA.

AERFOTOGRAFADO (PIV,11). Fotado elde aviadilo.

AEROFOTOGRAMETRIO. Planimetria determinado de teritorio per fotado el aviadilo. (laŭ PIV/s,19)

AF. Siglo de memenfokusigaj fotoaparatoj kaj objektivoj. →AŬTOFOKUSO

AF-FERMO. Sistemo por fiksi aŭtofokusilon de objektivo laŭ difinita distanco.

AF-FOTILO. →FOTILO AŬTOFOKUSA

AF-LUMIGILO. Fonto de infraruĝaj radioj ĉe →FOTILO AŬTOFOKUSA aŭ →FULMILO SPECIFA por AF-fotiloj, ebliganta enfokusigon eĉ mallume.

AF-SANĜILO. Fokusobligilo por ebligi uzadon de neaŭtofokusaj objektivoj ĉe aŭtofokusaj fotiloj.

- AKCELILO.** Kemia ingredienco akcelanta la nesufiĉan agadon de →RIVEL-AGANTO.
- AKCESORAĴO** (PIV,20). Ilo kompletiganta la funkciadon de fotilo.
- AKCESORAĴUJO.** Specifa loko ĉe aparato por enteni la akcesorajararon.
- AKTINAJ, Lumradioj, L.** influantaj lumsentivajn filmojn. (aŭ PIV,24)
- AKUMULATORO** (M,83). Portebla distribuilo de elektro-energio por →FULMILO, →LUMIGILO ktp.
- AKUMULILO** (EB,111/55).
→AKUMULATORO
- AKUO**** (EB,111/55). →AKUMULATORO
- AKUTANCO**.** Fizika mezurado pri kapablo de reproduktsistemo apartigi helajn kaj malhelajn lumojn de objekto.
- ALAJINGO.** →INGO POR AKCESORAĴOJ
- ALAJĴO.** ☒ →AKCESORAĴO
- ALAJUJO.** →AKCESORAĴUJO
- AMATORO-FOTOGRAFISTO.**
Tiu, kiu fotadas amatore k ne kiel profesia fotisto.
- ANASTIGMATO** (PIV,45). →OBJEKTIVO ANASTIGMATA
- ANSTROMO aŭ ANGSTROMO.**
Unuo de longo uzata en spektroskopio, k egala al 10^{-10} m. (PIV,51) Simbolo: Å.
- ANTAŬEKSPONADO.** ☒ Empiria tekniko por redukti la kontraston per mallonga kromeksponado de filmo antaŭ fotado.
- ANTIKVA FOTILO.** Fotoaparato ne plu produktata, havanta nur historian valoron.
- APERTURO** (PIV,58).
→DIAFRAGMA APERTURO
- ARĜENTA BROMIDO.** Salo precipitata en formo de kristaleroj. Emulsiita kun gelateno aŭ alia ligilo k ŝmirita sur subportilo, ĝi estigas filmon.
- ARĜENTA JODIDO.** Arĝenta halogenido pliiganta la sentivecon de fotoemulsioj.
- ARĜENTO METALA.** Rezulto post reduktprocedo de la arĝenta bromido per →RIVELADO.
- ASA.** Mezurunuo pri sentiveco de filmoj, decidita far la Usona organizo *AMERICAN STANDARD ASSOCIATION* [Usona Normo-Asocio]. Ĝi montras duobligon de impresiĝemo per aritmetika du-obligo de la gradoj.
- ASTIGMATECO.** Aberacio de optika sistemo, malproksima de la →OPTIKA AKAO, estiganta malfokusigon de bildo.
- ATINGOANGULO.** Mezuro per gradoj de la areo, kiun →FULMILO resp. →OBJEKTIVO kapablas atingi.
- AUTOCHROME.** Malnova patentita

sistemo por realigo de pozitivaj kolorbildoj.

AŬTOFOKUSO. Elektronika sistemo por aŭtomata kontrolo de la →ENFOKUSIGO.

AŬTOMATA EKSPONADO. Reguligo de ekspondaŭro pere de elektronika aŭtomato laŭ la indikoj de la →EKSPONOMETRO ENFOTILA.

AŬTOMATA FILMO-ENBOBENIĜO. Sistemo ĉe modernaj fotiloj, kiun regas la enkorpigita motoro, kune kun la streĉo de →OBTURATORO.

AŬTOMATAĴOJ. Elektraj k elektronikaj aparatoj memoblignantaj fiksi, sen interveno de la fotanto, ekspon-daŭron, diafragman aperturnon, interfokusan distancon ktp.

AŬTOMATA MALŜALTO. Energispara maŝalto de la elektra sistemo pere de aŭtomato, post fiksita tempo de neaktiveco.

AŬTOMATA ŜALTILO. Elektrokomutilo aŭtomate reganta aparatojn laŭ antaŭfiksitaj tempo-intervaloj.

AŬTOMATA ŜARGADO. Alkroĉado de la filmgvidilo k malvolvo de la filmo ĝis la unua →FILMOBILDO kun samtempa streĉo de la →OBTURATORO pere de motora sistemo, kiu ekfunk-

cias per fermo de la fotildorso.

AV. Siglo de nombro de →DIAFRAGMA APERTURO.

BAJONETA, Blokilo. Surfronta kanelo ĉe fotilo, kie apogiĝas k per rotacio fiksiĝas →OBJEKTIVO ŜANĜEBLA. →BLOKILO

BALGO (M,1232). Aparato plilongigebla, lumbaranta, por regulado de →ENFOKUSIGO k/aŭ →MALCENTRADO de la objektivo.

BALGO-FOTILO (EB,1117). Fotoaparato karakterizita de balgo, metita inter la ebena de objektivo k →EBENO FOKUSA.

BALGO-ŜIRMILO. Speciala alĝustebla lumŝirmilo por objektivoj.

BALTEO. Leda, ŝtofa aŭ plasta strio por subteno de fotilo aŭ →FOTILSAKO.

BALTEO-KROĈILO. Hokingo sur fotilkorpo, por fiksado de balteo.

BARELETA, Distordo.
→DISTORDO

BARITPAPERO (PIV,96).
→PRINTPAPER O BARITA

BASKULADO. ☒ Ĉe la optikstablaj fotosaparatoj, tipa modifo de la paralelismo inter objektiva k filma ebenaĵoj, por aliigi perspektivon k/aŭ kampo-profundon.

BATERIO. →PILO

BAZO-EBENO. Tiu surfaco, kie staras la masko-kadro ĉe →**PLI-GRANDIGATORO**.

BAZO-PLATO (EB, 111/26). Ĉe fotilo, tiu suba plato sen reguliloj.

BILDARUJO. ☒ Ujo, kiu entenas aron da selektitaj bildoj, karakterizantaj la stilon de fotisto.

BILDO ANALOGA. B. transigita al elektra formo.

BILDO-DENSOMETRO. ☒ Optik-elektronika mezurilo de densaj areoj ĉe negativa aŭ pozitiva filmobildo.

BILDO DIFUZA. B. havanta tre svenintajn detalojn eĉ se perfekte enfokusigita.

BILDO DIGITIGITA. B. konvertita al binaraj signaloj.

BILDO DUONOMBRUMITA. Printaĵo stompita ĉe randoj. →**DUONOMBRUMI**

BILDO HELTONA. ☒ B. karakterizita de lumaj tonoj kun eta →**KONTRASTO**.

BILDO-KALKULILO. Indikilo de la nombro de jam eksponitaj filmobildoj.

BILDO LATENTA. B. ne ekstere videbla ĉe →**FOTO-FILMO**, sed ekzistanta k aperigebla per →**RIVELADO**. (laŭ PIV, 819)

BILDO MALHELTONA. ☒ B. prezentanta precipe mallumajn tonojn.

BILDO STROBOSKOPA. Foto de objekto, ĝenerale moviĝanta, plurfoje registrita sur la sama filmobildo per →**STROBOSKOPO**.

BLANKIGO. ☒ Traktado, kiu preskaŭ malvidebligas bildon (k pozitivan k negativan) antaŭ tonigo aŭ aliaj prilaboradoj.

BLANK-NIGRA, Filmo. Unu el la aĉeteblaj filmspecoj: ĝi reproduktas la objekton pere de serio da griztonoj.

BLOKILO. Sistemo ebliganta rapidan interŝanĝon de la objektivoj ĉe fotilo. Ĝi estas duspeca: **bajoneta** aŭ **ŝraŭba**.

BLUVERDO. Unu el la →**KOLOROJ KOMPLEMENTAJ**.

B/N. →**BLANK-NIGRA**

BOBELNIVELILO (PIV, 740). Instrumento montranta horizontalecon ĉe kelkaj grandformataj fotiloj aŭ stativoj.

BRILA, Printpapero. Apartspeca surfaco de →**PRINTPAPERO**.

BRILECO-INTERVALO. Diferenco de lumeco inter la helaj k malhelaj lumoj de filmobildo; en la realo ekde 1 ĝis 150, sur filmo registreblas ekde 1 ĝis 125, sur sentiva printpapero de 1 ĝis 60.

BRILEGA, Printpapero. Apartspeca surfaco de →**PRINTPAPERO**.

BROMIDPAPER (PIV,128).

→PRINTPAPER BROMIDA

BRULIGOJ. Aldonaj lumekspozonadoj sur limigitaj areoj de sentivpapero dum printado per
→PLIGRANDIGATORO.

CALLIER-EFEKTO. Pliigo de kontrasto dum pligrandigo de negativoj havantaj tre densajn areojn, pere de →PLIGRANDIGATORO KUN →LUMO PUNKTOFORMA.

CANON ION [angle]. Patentita aparato por rekta registrado de bildo sur magneta subportilo.

CCD [angla akronimo: *Charge Coupled Device* = kupita ŝargilo]. Integrita lumsentiva cirkvito, utiligata por transigi bildojn al elektrosignaloj, kiu troviĝas ĉe aŭtofokusaj fotiloj k videokameroj.

CdS=Kadmia sulfuro. Kemiaĵo uzata en fotorezistancoj de lummezuriloj.

CELILO (EB,111/6). Optika sistemo, ebliganta enkadrigi k kelkaze kontroli la enfokusigon de la fototaĵo.

CELILO ALBADA. C. projektita de Van Albada, en kiu vidiĝas la efektiva fotadkampo de objektivo.

CELILO ANGULA. C. permesanta foti en direkto ortangula kompare al propra pozicio.

CELILO GALILEJA. Simpla C. laŭ la principo de Galileja teleskopo inversigita.

CELILO-LUKETO (EB,111/22). Antaŭa aperturo de celilo.

CELILO SPORTA. Metala kadro fleksebla por trarigardi objektoton, iam uzita ĉe profesiaj k duokulaj fotiloj.

CELILO ŜIRMITA. C. havanta fokusekranon protektitan kontraŭ mislumoj pere de lumo-ŝirmilo metala kun flekseblaj ŝutroj.

CELULOIDO. Celuloza kombinaĵo uzata kiel subportilo por fotoemulsioj. →PLASTA MATERIALO

CELUM-OBJEKTIVO. La pli supra objektivo ĉe →DUOKULA REFLEKTA FOTOLO, estiganta bildon sur smirgita vitro.

CIBACHROME [Ĉibakrome]. Patentonomo de pozitiva papero por kolorprintado de diapozitivoj.

C.I.E. - Commission Internationale de l'Eclairage [Internacia Komisiono pri Lumigado]. Institucio normiganta sistemon por priskribo de koloroj.

CIRKVITO THYRISTOR [Tiristor]. Sistemo, kiu ebligas ŝpari energion ĉe aŭtomataj elektronikaj fulmiloj, malpermesante kompletan malŝargon de la
→KONDENSATORO.

ĈEFLUMO. Baza lumfonto por difini ĝeneralan lumigadon.

ĈEFPUNKTO. Pozicio de la plej grava objekto en fotografaĵo.

ĈIAMPRETA FOTILUJO. Ujo kun malfirmebla antaŭa flanko, ebliganta elujan fotadon.

ĈIELLUMA FILTRILO. F. uzata dum fotado de montoj por mildigi troan ĉielan bluan en kolorbildoj.

DATLIMO. ☒ D. presita sur pak-aĵo de →**SENTIVMATERIALO**, post kiu la produktanto ne plu garantias optimuman kvaliton, ĉefe por →**FOTO-FILMO KOLORA**

DAYLIGHT [angle = taglumo]. Indiko sur filmpakaĵoj, kiu rilatas al kolortemperaturo je preskaŭ 5500/5700 °K.

DENSA. Malhela.

DENSECO. Grado de bild-nigrigo indikita per nombro.

DENSO-TONO. Superreganta bildkoloro ĉe iu ajn malhela parto de kolora fotoprintaĵo: **blueta** = tono malvarma; **ruĝ-bruna** = tono varma.

DEPEND-LUMILO. ☒ Fulmilo, kiu ekfunkcias per la →**TELEREGILO** de ĉefa lumaparato.

DESENTIVIGO. ☒ Procedo malpliganta la sentivon de negativa materialo B/N por ebligi rektan kontrolon, duoniume, de posta rivelado.

DIAFRAGMA APERTURO. Rejŝo inter la →**FOKUSA LONGO** k la reala diafragma truo-diametro. →**F**

DIAFRAGMA PRIORITATO. Elektronika sistemo por aŭtomate kondiĉi la programadon de →**EKSPON-DAŬRO** laŭ la elektita diafragma ĉe →**FOTILO AŬTOMATA**.

DIAFRAGMO (PIV,184). Sistemo por reguli la lumiradon tra objektivo. →**IRISA DIAFRAGMO**

DIAFRAGMO-RINGO. Instrumento kiu regulas la diafragma-aperturon ĉe objektivo.

DIAFRAGMO-SKALO. Indikaro de diafragma-aperturoj.

DIA-KADRETO.

→**DIAPOZITIVA KADRETO**

DIAO** (EB,112/48). →**DIAPOZITIVO**

DIAPOZITIVA FILMO.

→**FOTO-FILMO INVERSIGEBLA**

DIAPOZITIVA KADRETO (EB,112/49). K. por diapozitivaj, kutime plata.

DIAPOZITIVO (EB,112/48). Unuopa →**FILMOBILDO** de →**FOTO-FILMO INVERSIGEBLA**, ĝenerale kolora, enkadrigita.

DIAPOZITIV-TENILO (EB,112/57). Parto de →**DIA-PROJEKCILO** por lokado de la dia-kadretoj projekciozicie.

DIA-PROJEKCILO (EB,112/55). Aparato por projekcii diapozitivojn sur ekranon. (PIV,874)

DIA-REPRODUKTILO. Aparato por reproduktado de diapozitivoj pere de fotilo.

DIASKOPO** [Ŝanĝo de difino en PIV,186]. Manuzebla aparato kun pli grandiga lenso por rigardi diapozitivojn.

DIA-ŜARGILO. ☒ Linia aŭ ronda rako entenanta dia-kadretojn por aŭtomata projekciilo.

DIFINO. →DISIGPOVO

DIFRAKTO. Optika fenomeno de devio de la lumradioj okaze de eta diafragmo-aperturo.

DIFUZILO. Aparato el diafana materialo aŭ specifa filtrilo, metita antaŭ →LUMFONTO aŭ objektivo por mielde aliformigi la lumradiojn.

DIĜITIGO (M,457). Konvertado de bildo al binaraj signaloj.

DIN. Mezurunuo por filmsentivo, kiun fiksas la germana organizo *DEUTSCHE INDUSTRIE NORMEN* [Germanaj Industriaĵaj Normoj]. La sentivo duobliĝas ĉiun trian gradon.

DISIGPOVO. ☒ Kapablo de objektivo k/aŭ filmo evidentiĝi eĉ etajn detalojn de objekto.

DISTANCA REGILO.

→TELEREGILO

DISTANCO-SKALO (EB,111/13). Indikaro de distancoj por ĝusta enfokusigo de objekto.

DISTORDO. Optika difekto kaŭzita de diversmaniera projekciado de la oblikvaj radioj kompare al centraj; nomiĝas **bareleta**, kiam diafragmo antaŭas lenson, aŭ kontraŭe **kuseneta**.

DOMINANTA KOLORO. ☒ Unukromata koloro de la tuta bildo, kaŭzita de mis- aŭ intenc-uzo de →LUMIGADO aŭ de filmo aŭ de filtriloj, ĉe →KOLORFOTOGRAFIO.

DORSO. Malantaŭa pordeto de fotilo, ĉamirsisteme delokebla por en- aŭ el-igo de filmo.

DORSO ŜANĜEBLA. Dorsa ekipaĵo kun dato- aŭ program-registritilo, aŭ por →TUJRIVELADO.

DUKOLORA VUALO. Makulkolora vualo kaŭze de polucio aŭ elĉerpiĝo de →FIKSAĴO.

DUOBLA EKSPONADO.

→PLUREKSPONADO

DUOKULA REFLEKTO-FOTILO (EB,111/15). F. havanta du objektivojn; la supran por kadrado (→CELILO) k la malsupran por fotado.

DUONFORMATO. ☒ Filmobildo dimensie 18x24mm ĉe →FOTOFILMO MALGRANDFORMATATA.

DUONMALBRILA, Printpapero.
Apartspeca surfaco de →PRINT-
PAPERO.

DUONOMBRUMI (PIV,764). Heligi
bildon ĉe randoj ĝis tuta
malapero. →RANDSVENADO

DUONREFLEKTA SPEGULO.
Parto de →TELEMETRO JE DISIGITA
BILDO k de →REFLEKTO-POTILO.
→SPEGULO ĈEFA

DUONTONO. ☒ Griznuanco inter
blanko k nigro.

EBENO FOKUSA (PIV, 300). E. sur
kiu perfekte enfokusigita objek-
tivo estigas netan bildon.

EKRANO. Blanka aŭ refleka sur-
faco por projekciado de diapo-
zitivoj aŭ filmoj.

EKRANŜIRMILO (EB,111/16). Pro-
tektilo por la smirgita vitro ĉe
fotilo. →CEILO ŜIRMITA

EKSPONADO. Elmetado de sen-
tivmaterialo al efiko de lumo.
(laŭ PIV,224)

EKSPONADO B. [Inicialo de angla
vorto: *Bulb*] Obturil-regulado,
permesanta ties malfermon
dum premado de la →EKSPON-
BUTONO.

EKSPONAD-PRIORITATO.
→EKSPON-DAŬRA PRIORITATO

EKSPONAD-PROVO. ☒ Procedo
dum pligrandigado, per kiu
printpapero eksponatas laŭzo-
ne je malsama tempodaŭro

por havi la ĝustan ekspon-
daŭron.

EKSPON-AMPLEKSO. Kapabl-
eco de sentivmaterialo por to-
lero de →SUPER- k →SUB-
EKSPONADO, konservante sufi-
ĉan klarecnivelon de bildo.

EKSPONA ŜALTHORLOĜO
(EB,112/32). Tempoŝaltilo uzata
dum →PLIGRANDIGADO por regi
la ekspon-daŭron de sentivaj
printmaterialoj.

EKSPON-BUTONO (EB,111/5).
Regilo por mekanika aŭ
elektronika funkciado de la
obturilo.

EKSPON-DAŬRA PRIORITATO.
Sistemo per kiu la efekto de
→EKSPON-DAŬRO kondiĉas la
sekvan aŭtomatan progra-
madon de la →DIAFRAGMA
APERTURO.

EKSPON-DAŬRO. Tempo de
malfermiteco de la obturilo
dum lumeksponado de filmo.

EKSPON-EKVILIBRIGO. Kroma
pligo de →EKSPON-DAŬRO be-
zonata kaze de tro longdaŭraa
ekspono.

EKSPONOMETRA SENSORO
(M,1186). Enkorpigita →LUMĈELO
por mezurado de lumokvanto.

EKSPONOMETRO (PIV,224). Apa-
rato, kiu mezuras la luminten-
son (lumokvanton) k donas,
per gradigitaj skaloj, la ekzak-

tajn indikojn de ekspon-daŭro k diafragma aperturo surbaze de filmsentivo, laŭ du mezursistemoj: je →LUMO INCIDA aŭ je →L REFLEKTA.

EKSPONOMETRO-DIFUZILO.

Diafana, plasta ekipaĵo de eksponometro, metenda antaŭ la →LUMĈELO dum mezurado je →LUMO INCIDA.

EKSPONOMETRO ENFOTILA.

Lumĉelo ene de la nuntempaj fotiloj, kiu rekte regulas eksponadon laŭ antaŭfiksitaĵaj programoj (→DIAFRAGMA PRIORITATO, →EKSPON-DAŬRA PRIORITATO) per mezurado de la lumo traobjektive envenanta. →TRI.

EKSPONOMETRO SELEKT-ANGULA. ☒ Efektivigas selektivan mezuradon de la objekto-lumo laŭ 1-grada angulo aŭ malplie.

EKSPONPLATO. Bazo de →PLIGRANDIGATORO, kie apogiĝas →SENTIVMATERIALO aŭ →MASKO-KADRO.

EKSPON-PROKRASTILO (EB, 111/37). Mekanika aŭ elektromekanika ilo por prokrasti ekfunkciadon de obturilo ĝis kelkaj (kutime deko da) sekundoj, post premo de la →EKSPON-BUTONO.

EKSPON-REGILO (EB, 111/11, 20). Aparato por reguli la ekspon-daŭron ĉe neaŭtomataĵ fotiloj.

EKSPON-SKALO (EB, 111/11). Indikaro de ekspon-daŭroj ĉe →EKSPON-REGILO.

EKSTEREJO. Grundo por fotado de plenaeraj scenoj. (laŭ PIV, 225)

EMULSIO. Unuforma suspensio de lumsentivaj arĝento-halogenidoj en gelateno aŭ alia ĝelo.

ENERGIO-PROVIZADO. Liverado de E. bezonata por la elektraj cirkvitoj de moderna fotilo. →PILO

ENFOKUSIGA LEVILO (EB, 112/31). Aparato por enfokusigi bildon sur la sentiva printpapero ĉe la eksponplato de →PLIGRANDIGATORO.

ENFOKUSIGA LUPEO. Speciala lenso por korekte enfokusigi bildon sur →MASKO-KADRO dum →PLIGRANDIGADO.

ENFOKUSIGA METALRINGO. Instalajaĵo por reguli la enfokusigon de objektivo.

ENFOKUSIGA SMIRGITA VITRO. Ilo de fotoaparato, kiu ebligas kontroli bildon ĉe →REFLEKTO-FOTILO, →FOTILO ATELIERA k →OPTIKA STABLO.

ENFOKUSIGILO. →ENFOKUSIGA LEVILO

ENFOKUSIGO (PIV, 300). Regulado de →OBJEKTIVO ĉe fotilo por konverĝigi la lumradiojn al la →EBENO FOKUSA.

ENFOKUSIGO SELEKTIVA. Fotadetekniko por surfone reliefigi objekton pere de meza → **TELEOBJEKTIVO** tute malfermita.

ENHELIGO. ☒ Heligado—tekniko de ombroj ĉe plenluma objekto, pere de reflektita materialo aŭ artefarita lumo aŭ ankaŭ fulmilo.

ENKADRADO. Elektado de la fotota parto far fotografanto tra la celilo.

EPIDIASKOPO. Aparato povanta projekcii bildojn per surfalanta aŭ traŭranta lumo, tiel ke ĝi permesas projekcii ankaŭ ilustraĵojn el libroj ktp. (PIV,242)

EV [anglia akronimo: *Equivalent Value* = ekvivalenta indico]. Ĝusta dateno donita far la lummezurilo rilate al la lumokvanto reflektita de objekto: je ĉiu duobla lumintenseco ĝi pliiĝas de unu grado.

FAJNRETUŜO. ☒ Forigo el printaĵoj de eblaj etaj difektoj (grataĵetoj, spuroj de polvoj ks).

F. Nombro indikanta la lum—enprenon de objektivo. Ĝi montriĝas ankaŭ per *f*.

FERMILO. Aparato, kiu ebligas fiksi difinitajn indikoj de iuj aŭtomataĵoj (eksponilo, aŭtofokuso ktp) cele al realigo de kontraŭlumaj bildoj aŭ akiro de → **ENFOKUSIGO SELEKTIVA.**

FIKSAĴO. Solvaĵo transformanta neekspozitajn halogenidojn al solveblaj saloj, forigendaj dum fina lavado.

FIKSAĴO HARDECA. Fiksaĵo entenanta malmoligantan kemiaĵon. → **HARDIGENZO**

FIKSBANO (PIV, 283). → **FIKSAĴO**

FIKSKUVO (EB,112/3). Ujo por la fiksaĵo dum rivelprocedo.

FILMBOBENUJO (EB,111/3). Speciale loko en fotilo por la → **FILMKARTOĈO** aŭ la → **ŜARGILO.**

FILMERO (M,565). Unuopa bildo de kinematografia filmo.

FILMGVIDILO. ☒ Speciale ŝtancita komenca parto de filmo, uzata por ĝin ŝargi en la fotilo.

FILMKARTOĈO (EB,112/26). Cilindra volvaĵo de filmo, kovrita per nigra papero, por ŝargi fotilon eĉ en plena lumo. (laŭ PIV, 493)

FILMO. Bendo de celuloza substanco, kovrita per fotoemulsio, je malsamaj dimensioj, uzata en fotografio; ĝi povas esti **B/N** aŭ **kolora**; tiu flanke ŝtancita, je ĝenerala uzo en kinematografio, uzatas krome en fotografio, envolvita en aparta ŝargilo. → **FOTILO 35mm-A**

FILMO-ANTAŬENIRO. Delokigo de unu filmobildo post ekspozonado; farebla aŭtomate aŭ permane.

FILMOBILDO. Unuopa bildo de
→FOTO-FILMO.

FILMO-BOBENILO. Lumbaranta
aparato por ŝargi 35mm-ŝargi-
ilojn per laŭmetra filmo.

FILMO NERIVELITA. Jam ekspo-
nita F. submetota al →RIVEL-
ADO.

FILMO NEUZITA. →FILMO VIRGA

FILMO-PLATO. Vitroplato ŝmir-
ita per emulsio, iam uzita por
fotografi.

FILMO RADIOGRAFIA. Aparta F.
uzata por radiografia esplora-
do. →IKS-RADIOJ

FILMO RIVELITA. F. jam sub-
metita al →RIVELADO.

FILMO UZITA (M,906). F. jam ek-
sponita al lumo.

FILMO VIRGA (M,906). F. ankoraŭ
ne eksponita al lumo.

FILM-PAKO. Pakita aro da foto-
filmaj folioj por profesia utiligo,
krome uzata en procedoj de
→TUJRIVELADO.

FILMPORTILO. Ligna, metala aŭ
plasta ujo iam por du
filmo-platoj k nun por du
foto-filmaj folioj, uzata ĉe pro-
fesiaj fotiloj.

FILMREVOLVA BUTONO (EB,
111/23). Regilo por revolvi la
filmon ĉe neaŭtomataj fotiloj.

FILMTENILO (EB,112/30). Subten-
ujo por foto-filmo en →PLI-
GRANDIGATORO.

FILMVIŜILO (EB,112/39). Speciala
pinĉilo por malkrempo filmon.

FILTRADO. Korektado per speci-
fa filtrilo de la kunmetado de
lumradioj enirantaj la fotilon.

FILTRILA FAKTORO. Indico de
la necesa ekspono-pliigo dum
uzado de specifa filtrilo.

FILTRILO. Ilo el vitro, plasto aŭ
gelateno, kiu lokigas antaŭ la
objektivo por modifi la lum-
radiojn enirantajn la fotilon. Ĝi
kapablas interveni ĉe koloroj
(→KOLORFILTRILO k →FILTRILO
TRANSIGA), modifi la kontraston
(→DIFUZILO), modifi la formojn
(→FILTRILO KREIVA), kontroli la
lumreflektadon (→POLARIZILO)
ktp.

FILTRILO GELATENA. F. por
profesia uzado.

FILTRILO KOMPENSA. →FILTRI-
ILO TRANSIGA

FILTRILO TRANSIGA. ☒ F. ru-
ĝa aŭ blua, kiu kapablas ŝanĝi
la kolortemperaturon de lumo
ĉe →KOLORFOTAGRAFIO.

FILTRILO KREIVA. ☒ F. kiu ebl-
igas estiĝi specialajn efektojn
dum fotado.

FILTRILO POLARIZA.
→POLARIZILO

FLANĜO DE STATIVŜRAŬBO

(EB,111/32). Mekanismo por bloki fotilon ĉe →TRIGAMBA STATIVO aŭ →TABLO-STATIVO.

FLANKLUMIGADO. Liverado de lumo nur al unu flanko de objekto.

FLUORESKO. Lumeligo fare de kelkaj substancoj, ekscititaj de apartaj radiadoj.

FOKUSA LONGO. Distanco inter la optika centro de lenso aŭ objektivo k la →EBENO FOKUSA sur kiu enfokusigita neta bildo de objekto je senfina malproksimo.

FOKUSA PROFUNDO (PIV,300). Zono cis k trans la →EBENO FOKUSA, kie perfekte enfokusigita objektivo estigas kontentige netan bildon.

FOKUSEBENA OBTURATORO (EB,111/44). →KURTEN-OBTURATORO

FOKUSO. Punkto sur la →OPTIKA AKSO, kie konverĝas la radioj senditaj el unu lumfonto, post ilia traĵo tra lenso aŭ optika sistemo. (aŭ PIV,300)

FOKUSO-KONVERTORO. ☒ Lenso aŭ lensaro metebla antaŭ →OBJEKTIVO por estiĝi pli longigon de ĝia →FOKUSA LONGO.

FONOPROJEKCILO. ☒ Aparato

por projekcii bildojn kulisfone de ateliero.

FORKO-EKSPONADO. ☒ Tekniko por fotadi la saman objekton de 2 ĝis 4 fojoj, ĉiam ŝanĝante la ekspozicion, cele al la dezirata rezulto.

FORMATO. Dimensio de filmbendoj k printpaperoj.

FORMATO GRANDA. F. de fotofilma folio, ekde 9x13 cm k pli, uzata ĉe →OPTIKA STABLO, →FOTILO ATELIERA k →F. PROFESIA. Grandformata →PRINTPAPERŬO dimensias ekde 18x24 cm k plie.

FORMATO MALGRANDA. F. de fotofilmo en ŝargilo: (110) 13x17 mm, (126) 24x24 mm k (135) 24x36 mm.

FORMATO MEZA. F. de fotofilmoj: (120) 6x6 - 4,5x6 cm k (220) 6x7 - 6x9 cm. Mezformata →PRINTPAPERŬO dimensias de 6x9 cm ĝis 13x18 cm.

FOTAD-ANGULO (PIV,311). Mezuro per gradoj de la kampo, kiun →OBJEKTIVO kapablas kapti.

FOTADO. Praktika uzado de fotilo por akiri bildon de →OBJEKTO.

FOTAĴO. →FOTOGRAFAĴO

FOTI (PIV,311). →FOT(OGRAFI)

FOTILĈASIO. ☒ Tiu ĉefa strukturo (plasta, alumin-atoja aŭ me-

talo—piasta) de fotilo, entenanta la fokuson eblon, kie almetiĝas la aliaj eroj.

FOTIL—DENTRELO. Sistemo por preciza enfokusigo ĉe →OPTIKA STABLO.

FOTILKORPO. Filmujo lumbanta, kiun havas ĉiuj aparatoj k aŭtomatoj por foti.

FOTILO. Aparato, kiu ebligas eksponi sentivan materialon por realigi fotojn. Laŭcele, prezentigas sub malsamaj aspektoj k funkcioj.

FOTILO 35mm-A. Fotilspeco, kiun karakterizas balgomanko k uzebleco de objektivoj ŝanĝeblaj je malsama →FOKUSA LONGO. En ĝi uzatas kinematografa filmo ŝargite envolvita.

FOTILO AMFIBIA. Fotoaparato subakve uzebla.

FOTILO ATELIERA. Grandformata aparato por profesia fotado (portreto, muta naturo, kolorselektado, ks).

FOTILO AŬTOFOKUSA. Fotoaparato havanta aŭtomatan enfokusigon. →AŬTOFOKUSO

FOTILO AŬTOMATA. Fotoaparato kapabla aŭtomate reguli ekspon—daŭron k/aŭ diafragmon.

FOTILO ĈIAVETERA. Kompakta fotoaparato rezistanta al akvo,

polvo aŭ sablo, sed ne subakve uzebla. →TROPIKUMIGO

FOTILO GRANDFORMATA. Fotoaparato utiliganta sentivmaterialon je →FORMATO GRANDA. →OPTIKA STABLO

FOTILO KOMPAKTA. 35mm—a aŭtomata fotilo, dimensie malgranda, kun enstanta fulmlilo, antaŭeniriga motoro, neŝanĝebla objektivo, k enfokusigo libera, aŭ →AŬTOFOKUSO aŭ →ZOM—AŬTOFOKUSO. Vidsistemo: t.n. →CELULO GALILEJA.

FOTILO MALGRANDFORMATA. Fotoaparato utiliganta filmojn je →FORMATO MALGRANDA.

FOTILO MANA. Fotoaparato, en kiu eblas, krom aŭtomate, ankaŭ mane pretigi la duopon ekspon—daŭro/diafragma aper-turo.

FOTILO MEZFORMATA. Fotoaparato utiliganta filmojn je →FORMATO MEZA.

FOTILO MOVKORPA. →OPTIKA STABLO

FOTILO POŜA. Fotoaparato utiliganta filmojn je →FORMATO MALGRANDA (110).

FOTILO PROFESIA. Mezformata specifa aparato por fotado raportista, sporta, aera ks.

FOTILO PROGRAMITA. Fotoaparato, kiu utiligas aŭtomaton

de eksponado, jam ĉeffabrike programitan, laŭ antaŭpretigitaj duopoj pri ekspon-daŭro/diafragmo-aperturo. →PROGRAMO

FOTILO RAPORTISTA. ☒ Tipa fotilo de Usona raportisto ĝis la Kvindekaj jaroj. Formato 4x5 koloroj, fleksebla.

FOTILO TTL. F. kun →EKSPONOMETRO ENFOTILA, kiu mezuras la lumon per sistemo →TTL.

FOTILO UNU-NUR-UZA (M,1383). Ege simpla fotoaparato aŭtomata, kiu jam entenas filmon k uzeblas nur unufoje.

FOTILPLATO. Supera parto de stativo, kie la fotoaparato fiksiga.

FOTILSAKO. Specifa ujo entenanta la fotilon kune kun porteblaj akcesorajoj.

FOTILUJO. Entenas la fotilon por ĝin ŝirmi kontraŭ eblaj damaĝoj (polvo, pluvo, kolizioj ks).

FOTISTO. →FOT(OGRAFI)ISTO

FOTO. →FOT(OGRAFI)AJO

FOTOAFIŜO. ☒ Grandformata reprodukto de fotojo uzebla kiel dekoracio.

FOTO-AKCESORAJOJ (EB,111/31-59). Helpiloj por fotografado.

FOTO-ALAJOJ. ☒ →FOTO-AKCESORAJOJ

FOTO-ALBUMO (EB,112/52). Albumo por kolekti fotojn. Ĝi povas esti kun paperfolioj aŭ kun travideblaj plastaj poŝetoj.

FOTOAPARATO. →FOTILO

FOTOBILDO. B. arte kreita, per unu aŭ pluraj aĵoj metitaj inter lumfonto k filmo aŭ printpapero.

FOTO-EMULSIO. →EMULSIO

FOTO-FILMA BOBENO. Cilindro samaksa kun →ŜARGLEVILO aŭ kunligita kun motoro, ĉirkaŭ kiu enbobeniĝas la eksponita filmo.

FOTO-FILMA FOLIO. F. je malsamaj formatoj, uzata por →OPTIKA STABLO, →FOTILO ATELIERA k →F. PROFESIA.

FOTO-FILMO. Maldika celuloza plato kovrita per fotoemulsio, uzata ĉe fotoaparatoj en formo de folioj aŭ bendoj. →FILMO

FOTO-FILMO DIAPOZITIVA.
→FOTO-FILMO INVERSIGEBLA

FOTO-FILMO MALGRANDFORMATA. →FORMATO MALGRANDA

FOTO-FILMO GRAVURA. Alt-kontrasta F. por →FOTOGRAVURADO.

FOTO-FILMO INFRARUĜA. F. B/N aŭ kolora je tri tavoloj, el

kiuj du sentivaj al videblaj radioj k unu al infraruĝaj; uzata teknik- k scienco—cele.

FOTO-FILMO INVERSIGEBLA.

F. en kiu, sekve de eksponado al lumo k rivelprocedo, rekte formiĝas pozitiva bildo.

FOTO-FILMO KOLORA. Plurta-vola F. por registri kolorbildojn: povas esti negativa aŭ inversigebla.

FOTO-FILMO LANTA. F. kun malalta sentivo, en kiu ĉeestado de etaj granuloj efikas al altdifina bildo.

FOTO-FILMO NEGATIVA. F. prezentanta bildon, blank-nigran aŭ koloran, per tonoj kontraŭaj kompare kun tiuj de la objekto.

FOTO-FILMO ORTOKROMATA (PIV,778). B/N F. sentiva al blua k verda sed ne al ruĝa koloroj.

FOTO-FILMO PANKROMATA. B/N F. sentiva al ĉiuj koloroj. (laŭ PIV,786)

FOTO-FILMO POR LUMO ARTEFARITA. B/N aŭ kolora F. sentiva al lumoj je 3200 °K.

FOTO-FILMO POR LUMO NATURA. B/N aŭ kolora F. sentiva al lumoj je 5500 °K.

FOTO-FILMO RAPIDA. Altsentiva F.

FOTOFLUDO.** Alttensia lampo enkorpiĝanta reflektilon, je kolortempuro de 3400 °K.

FOTOGRAFA APARATO.

→FOTILO

FOT(OGRAF)AĴO. Bildo farita per fotografado. (PIV,311)

FOT(OGRAF)I (PIV,311). Fari bildojn de objektoj aŭ personoj pere de fotilo.

FOTOGRAFIA LABOREJO. Ejo taŭge ekipita por la rivelprocedo de sentivmaterialo.

FOT(OGRAF)ILO. →FOTILO

FOTOGRAFIO (PIV,311). Reprodukado de la realo per kemifizika procedo utiliganta la sentivecon al lumoj de kelkaj arĝento-komponaĵoj.

FOTOGRAFIO STROBOSKOPA. Analizo de movoj pere de fiksa bildo, kiun estigas la fotadtekniko →MALFERM-OBO k uzado de →STROBOSKOPO.

FOT(OGRAF)ISTO (EB,112/45). Tiu, kiu profesie okupiĝas pri →FOTADO.

FOTOGRAVURADO (M,565). Procedo produktanta per lumo kliŝojn por presado. (laŭ PIV,311)

FOTOMETRIO. Parto de la optiko, kiu okupiĝas pri la kompara mezurado de lumfontoj. (laŭ PIV,311)

FOTOMETRO. Instrumento por mezuri la intensecon de lumo.
(laŭ PIV,311)

FOTO-PARALAKSO. ☒ Fenomeno estiganta reproduktadon de kampo iomete diferenca de tiu kadrita far la celilo dum fotado de tre proksimaj objektoj per aparato kun →CELILO GALILEJA aŭ per →DUOKULA REFLEKTO-FOTILO.

FOTO-PORTRETIKO. ☒ Fotografio specife rilata al portretoj de homoj, arte interpretanta illan karakteron.

FOTORAPORTISTO. Tiu, kiu fotas novaĵojn laŭ komisiono fare de gazetoj aŭ inform-agentoj.

FP. Simbolo por la sinkronkonektilo de ampola fulmilo ĉe neaŭtomata kurten-obturila fotoaparato.

FRESNEL-a LENSO. Ĉe →REFLEKTO-FOTILO, aparta optika kondensoro je koncentraj cirkloj, por havigi tre helan bildon en la celilo.

FULMILA INGO. ☒ →AKCESORAJUJO enhavanta specialajn kontaktilojn por →FULMILO SPECIFA.

FULMILO. Aparato por artefarita lumigado per intensaj k ege mallongdaŭraj lumellasoj; ĝenerale portebla. Angle t.n. *Flash*.

FULMILO AMPOLA (EB,111/49). Utiligas lampojn nur unufoje uzebajn.

FULMILO ELEKTRONIKA. F. kiu eligas ege maldaŭran fulmon (de 1/1000 ĝis 1/30000 da sekundo) sed tre intensan, kun →KOLORTEMPERATURO simila al tiu suna; laŭcele diversforma.

FULMILO LONGDAŬRA. ☒ F. elektronika eliganta vicon da lumimpulsoj; por kurten-obturifaj fotiloj.

FULMILO RINGOFORMA. F. elektronika, kies lampo cirkaŭas la objektivon, donanta senombran lumigadon; specife taŭga por →MAKROFOTOGRAFIO.

FULMILO SPECIFA. F. speciale projektita por la elektronika cirkvito de aparta fotilo.

FULMILO SUBAKVA. F. ŝirmita en →SUBAKVA GARDUJO por foti subakve.

FULMILO SUPER FP.
→FULMILO LONGDAŬRA

FULMILO TTL. F. kun aŭtomata kontrolo de la fulmila ekspondaŭro per mezurado de la fulmila lumo traobjektive envenanta.

FULMIL-SERVO. Lumĉela sistemo por sinkrone ekŝalti plurajn fulmilojn.

FULM(LUM)ILO (EB, 111/49).
→FULMILO

FULMLUMO NEREKTA. Metodo produktanta pli difuzan lumon per turnado de →FULMILO al ĉambroplafono aŭ reflektanta surfaco.

FULMOAMPOLO (EB,111/53). Lampo por fulmilo unufoje uz- ebla.

FULMO-TUBO (EB, 111/58). Vitra ampolo ĉe elektronika fulmilo, en kiu okazas la elektra sparko estiganta lampon.

GaAsP = Galia fosfoarsenido. Kemiaĵo utiligata en lumĉeloj.

GELATENO. Natura proteino util- igata por suspensii la argen- to-halogenidojn en emulsioj.

GLACEIGA APARATO (M,1223). A. por rapida sekigado k sam- tempa brilado de →PRINTPAPE- RO, ĉe fino de riveladprocedo.

GLACEIGADO. Procedo por bri- ligi la surfacon de →PRINTPA- PERO.

GLACEIGA PLATO. Metala plato kromita, sur kiu oni frontpre- mas printpaperojn por ilin gla- ceigi dum sekigado.

GLACEIGILO. →GLACEIGA APARATO

GLOBARTIKO (EB, 112/44). Artiko de stativkapo permesanta taŭ- ge pozicii fotilon.

GoSt [rusa akronimo de *Gosudarstvennyj Standard* = sentiveco normiga].

Sistemo uzata en iama Sovet- unio por indiki la filmsentiv- econ.

GRADIGO (M,606). Ton- k kon- trast-skalo de filmobildo: ekde la mola ĝis la kontrasta grado.

GRANULO. Grajno el kristaliĝo de halogenidoj, kies grando e- fikas sur la sentivon k difinon de filmo.

GRIZTONA SKALO. ☒ Tabelo montranta la griztonajn nuan- cojn inter 0 (blanka) k 100 (nigra).

GVID-LAMPO. L. ĉe fulmiloj, kiu ebligas antaŭvidi la finan efek- ton de la fulmilo →LUMIGADO.

GVIDO-NOMBRO. Indico de la potenco de →FULMILO.

HALOGENIDOJ. Arĝentaj saloj de halogenaj acidoj, kiujn en- tenas →FOTOEMULSIO. Post ek- lumigo, H. transformiĝas en nigran metalan arĝenton, sek- ve de reduktiva kemia pro- cedo.

HALOO [Sango de difino en PIV,371]. Efekto de duobla bildo estigita de parto de eksponitumo, reflektita, post transirado de fotoemulsio, fare de la tra- videbla subportilo. Ĝin forigas la filma →KONTRAŬHALOILO.

HALTIGENZO ** (EB,112/2). Solv- aĵo neŭtriganta la rivelagadon.

HALTIGKUVO (EB,112/2). Ujo de la
→**HALTIGENZO** dum rivelprocedo.

HARAO** Aberacio de optika
sistemo, kaŭzita de lumradioj
neparalelaj al la optika akso;
ĝin reduktas progresiva fermo
de la →**DIAFRAGMO**.

HARDIGENZO** Kemiaĵo mal-
moliganta la emulsion por ĝin
protekti kontraŭ hazardaj da-
maĝagadoj dum rivelprocedo.

HELAJ LUMOJ. Partoj de bildo,
tre densaj ĉe negativo, tre he-
laj ĉe pozitivo (diapozitivo aŭ
printaĵo).

HIPERFOKUSA DISTANCO. ☒
Minimuma distanco de enfo-
kusigo havanta infiniton kiel
sian superan limon.

HOLOGRAFIO. Tekniko de rel-
iefa fotografado, uzanta inter-
feradojn estigitajn de du lase-
raj faskoj; inventita en 1948 far
G. Gabor, hungara. (laŭ PIV,396)

IKS-FOTOGRAFAĴO (PIV,414).
Bildo de la interno de korpo
farita per →**IKS-RADIOJ**.
→**FILMO RADIOGRAFIA**

IKS-RADIOJ (PIV,414). Elektro-
magneta radiado transviola.

INFRARUĜAJ, Lumradioj (PIV,
944). L. trans 7200 Å, neper-
cepteblaj de homa okulo sed
registreblaj fare de specifaj
filmbendoj teknik- k scienco-
cele.

INGO POR AKCESORAĴOJ
(EB,111/21). Speciala instalaĵo
de →**FOTILO**, kie fiksiĝas la
diversaj →**AKCESORAĴOJ**.

INTERFOKUSA DISTANCO
(PIV,300). Distanco inter la fo-
kusa ebena de ekrano k lenso
de projekciilo.

INTERIORO (laŭ PIV,436). Bildo de
internaj lokoj. →**INTERNFOTADO**

INTERNA FOKUSO. Enfokusiga
sistemo ne postulanta pliiŝong-
igon de la bareleto ĉe long-
fokusa objektivo.

INTERNFOTADO. Akiri bildojn
per →**FOTILO** interne de domo,
salono ks.

INTERSPACO** Distanco inter
filmebena k objektivo-bazo;
malsamas ĉe diversfabrikaj fo-
tiloj, ne ebligante ŝanĝon de
objektivoj. →**ADAPTO-RINGO**

INVERSIGA RINGO. Instalaĵo,
kiu ebligas fiksi objektivon laŭ
inversa pozicio, specifcele.

IR-INDICO. Signo sur la distan-
co-skalo por enfokusigo de
→**FOTO-FILMO INFRARUĜA**.

IRISA DIAFRAGMO (PIV,184). D.
kiun konsistigas pluraj lamen-
etoj estigantaj rondan truon je
variebla diametro.

ISO. Indicoskalo de filmosentiv-
eco; analoga al ASA-skalo.

°K = Kelvin. Unuo de absoluta temperaturo uzata dum mezurado de la luma → **KOLORTEMPERATURO.**

KADRADO. Vidkampo fotita per objektivo.

KAMPA KURBECO. Optika aberacio enfokusiganta bildon ĉe kurba surfaco anstataŭ sur la → **EBENO FOKUSA.**

KAMPA PROFUNDO (PIV, 872) (M,993). Parto de la objekto, nete difinita sur la → **EBENO FOKUSA**, laŭ la uzita diafragmo-aperturo.

KANDELO. Certa fiksita unuo de lum-intenseco. (PIV, 477)

KAPTO-ENFOKUSIGO. ☒ Aŭto-fokusa aŭtomato ebliganta malfermon de → **OBTURATORO** nur kiam objekto trairas la antaŭfiksitan zonon de korekta enfokusigo.

KD. Plasta plato, kien transiĝas filmobildoj, sekve de diĝitigo, por postaj videbligado sur televidekrano aŭ prilaborado per komputoro.

KELVINOMETRO.** Mezurilo de → **KOLORTEMPERATURO.**

KODAK PHOTO CD. Fotografika patentsistemo, kiu diĝitigas bildojn, ilin transigante poste sur → **KD.**

KODO DX. Sistemo por aŭtomate

mezuri la sentivon de filmo dum ties ŝargado en aŭtomatan fotilon.

KOLOIDA ARGENTO. Ŝvebanta arĝento en riveladsolvajoj, kapabla estiĝi formadon de → **DUKOLORA VUALO.**

KOLORFILMO.
→ **FOTO-FILMO KOLORA**

KOLORFILTRILO (EB,111/48). Ilo modifanta la kunmetadon de lumradioj venantaj de objekto, cele al akiro de korektaĵoj aŭ apartaĵefektoj.

KOLORFOTOGRAFIO. Fotado per → **FOTO-FILMO KOLORA.**

KOLORO-ANALIZILO. Aparato por determini la konsiston de kolora lumo.

KOLOROJ KOMPLEMENTAJ.
→ **BLUVERDA**, flava k → **PURPURA** (blua-ruĝa) koloroj; nomiĝas ankaŭ sekundaraj.

KOLOROJ PRIMARAJ. Ruĝa, verda k blua koloroj.

KOLORPRINTAĴO. Bildo reproduktanta la kolorojn de objekto.

KOLORTEMPERATURO. Taksado de lumkvalito laŭ °K-gradoj.

KOLORTRANDONADO. ☒ Altkvalita tekniko de subtraha kolorprintado.

KOMPAKTA DISKO. → **KD**

KOMPLEMENTAJ, Koloroj.

→KOLOROJ KOMPLEMENTAJ

KONDENSATORO. Elektronika aparato ĉe →FULMILOJ, produktanta intensajn elektrajn malŝarĝojn.

KONDENSORO. Kampolenso, servanta por kolekti radiojn en certa parto de optika aparato. (PIV, 542)

KONEKTILO DE PERKABLA TELEREGADO. Ingo kie konektiĝas kableto de →TELEREGILO.

KONFUZORINGOJ. Ringoj konsistigantaj, ĉe →EBENO FOKUSA, la bildon de objektoj starantaj cise k transe de la enfokusigita ebena. Tiujn toleras homa okulo ĝis diametro de 0,03 mm.

KONKO. ☒ Ŝimilo el mola gumo almetita al okulario de fotoaparato, kontraŭ lumo.

KONSERVANTO. Kemia kontraŭoksidanta ingredienco de →RIVELILO.

KONTAKT-PRINTADO. Estigo de printaĵo samgranda kiel negativo, per →KOPIKADRO aŭ →PRINTAPARATO.

KONTINUA FONO. ☒ Granda ateliera F. kiun konsistigas la vandoj kunigitaj kun la planko per progresiva kurbeco.

KONTRASTBILDO. Bildo ne havanta duontonojn.

KONTRASTO. Proporcio inter lumoj k ombroj.

KONTRAŬGUTA AGANTO.
→MOLIGAGANTO

KONTRAŬHALOILO (PIV,371). Grizkolora tavolo, inter subportilo k sentiva emulsio, kiu adsorbas lumon k malhelpas reflektajojn dum eksponado; malaperas dum filmotraktado.

KONTRAŬLUME (PIV,654). Fotadsituacio, en kiu la objekto situas inter la fotilo k la ĉefa lumfonto.

KONVERĜAJ LINIOJ. Perspektivaj linioj, kiuj prezentiĝas tre konverĝaj en apartaj bildoj. Eblas ilin rektigi fotante per →OPTIKA STABLO (→MALCENTRADO) aŭ poste dum →PLIGRANDIGADO.

KOPIKADRO (PIV,465). Aparato por kontaktigi la negativon kun printpapero dum →KONTAKT-PRINTADO.

KROMATOGENAJ ADICILOJ. Kemiaĵoj, kiuj reagas kun kromatiga substanco dum rivelprocedo k konsistigas videblajn kolorojn ĉe →FOTO-FILMO KOLORA.

KROMOGENA PROCEDO.** Kolorprocedo utiliganta kolorigilojn, kemie estigitajn dum rivelado.

KURTEN-OBTURATORO. O. lokita ĝuste antaŭ la filmo, kiu

estigas eksponadon per moviĝo horizontala aŭ vertikala de du kurtenetoj, limigantaj ŝanĝeblan fendeton.

KUSENETA, Distordo. → DISTORDO

KUVETO (EB, 112/36). Plastikuvo ortangulforma por traktado de sentiva printpapero.

KVARCO-LAMPO.

→ LAMPO HALOGENA

KVERPANELO. ☒ Ilo fiksita al lumigiloj aŭ fulmiloj por laŭbezone malpliigi la lumfaskon.

LAMENETO (EB, 111/45) (M, 730). Tre maldika metala plato, ero de → DIAFRAGMO aŭ → OBTURATORO.

LAMPO. Inkandeska → LUM(I)ILO utiligata por → INTERNFOTADO.

LAMPO HALOGENA (M, 112). Malgranda k potenca lampo kun tungstena filamento, je konstantaj → KOLORTEMPERATURO k lumintenso.

LAMPO SUPERTENSIITA. *** Lampo uzata je tensio pli alta ol tiu normala.

LAMPTENILO (EB, 111/57). Korpo de fulmilo.

LAMPUJO (EB, 112/29). Loko entenanta lampon ĉe → PLIGRANDIGATORO.

LANTSINKRONO. Fulmilo sinkronigita laŭ longaj ekspon-daŭroj por fotado eĉ de medio-lumo.

LAVADO. Fina bano de la rivelprocedo.

LAVKUVO (EB, 112/4). Ujo por fina lavado de fotofilmo aŭ printpapero dum rivelprocedo.

LCD [angla akronimo: *Liquid Crystal Display* = montrilo el fluecaj kristaloj].

LED [angla akronimo: *Light-Emitting Diode* = lumeliga diodo].

→ LUMDIODO

LEGADO SELEKT-ANGULA. ☒

→ MEZURADO SELEKT-ANGULA

LENZO. Vitraĵo, aparte prilaborita, deviiganta la rektolinian vojon de la lumradioj; ero por konstruado de objektivo.

→ REFRAKTO

LENZO ADICIA. L. metebla antaŭ la objektivo por fotografi tre proksiman objekton.

LENZO FLOSANTA. ☒ Regulig-sistemo inter la malantaŭaj lensoj de → OBJEKTIVO MALLONGFOKUSA, por optimumi fotadon.

LENZO KUN FLUORITO. Aparta → LENZO MINIMUME DISPERSIVA uzata ĉe tre lumecaj teleobjektivoj pro sia minimuma → ABERACIO KROMATA.

LENZO MINIMUME DISPERSIVA. L. kun alta refraktindico pro aparta kvalito de la optika vitro.
→ REFRAKTO

LENZO NESFERA. L. kies surfaco ne estas parto de sfero.

LUKSO. Unuo de lumiga intenso.
(PIV,652)

LUMANCO.** Kvanto da lumenergio eligita aŭ reflektita de objekto.

LUM-BARA SAKO. ☒ Tolsako lumbaranta, zipe fernebla, permesanta manipuladojn, tra mufoj, de → **SENTIVMATERIALO**, eĉ plenlume.

LUMBENKO. Grand-dimensia k -potenca → **LUM(IG)ILO** donanta altgradan k difuzan lumintenson.

LUMĈELO. → **LUMELEKTRA ĈELO**

LUMDIODO (M,740). Elektronika tubo utila por malgrandaj lum-signaloj en la celilo.

LUMELEKTRA ĈELO (M,287). Duonkonduktilo utiligata por funkciigi eksponometrojn.

LUMENO. Unuo de lumflukso.
(PIV,655)

LUM-ENPRENO (M,763). Indiko de la maksimuma → **DIAFRAGMA APERTURO** de objektivo. → **F**.

LUMFONTO. lo el kiu eliĝas
→ **LUMRADIO**-j.

LUMFORTO (M,763). Lumkvanto, kiun eligas → **LUMFONTO**.

LUMIGADO (PIV,654). Liverado de lumo al objekto, ejo ks.

LUM(IG)ILO. Fonto de lumo artefarita. → **FOTOFLUDO**, → **FULMILO**,
→ **LUMJETILO**

LUMIG-PROPORCIO. ☒ Rilato inter la lumaj k nelumaj partoj de objekto.

LUMJETILO. Elektra lum(ig)ilo.

LUMJETILO REFLEKTA. L. ne rekte projekcianta la lumon de inkandeska lampo.

LUMKAPABLO (M,763).
→ **LUM-ENPRENO**

LUMMEZURILO (EB,111/38).
→ **EKSPONOMETRO**

LUMO. Kampo de elektromagnetaj radioj percepteblaj de homa okulo, je ondolongo inter ĉ 3900 Å k 7700 Å.

LUMO ARTEFARITA. L. eligita de lampoj aŭ fulmiiloj.

LUMO DIFUZA (M,457). L. ne estiganta difinitajn ombrojn.

LUMO FLUORESKA.
→ **FLUORESKO**

LUMO FRONTA. L. fronte alvenanta al objekto.

LUMO INCIDA. L. direkten al la objekto, kiun utiligas aparta eksponometra mezursistemo.

LUMO INKANDESKA. L. el fonto en blankarda stato, kiel tungstena lampfilamento.

LUMO KRUDA. ☒ L. estiganta densajn ombrojn.

LUMO MALKRUDA.

→LUMO DIFUZA

LUMO MALVARMA. L. eligita de aparta fluoreska lampo, ĉe iuj profesiaj pligrandigatoj.**LUMO-MEZURADO.** Kalkulado de la lumkvanto pere de →EKSPONOMETRO.**LUMO-MEZURILO.**

→EKSPONOMETRO

LUMO MONOKROMATA (PIV, 709). L. konsistanta el radioj je ununura →ONDOLONGO.**LUMO NATURA.** L. normale eligita de suno. Ankaŭ nomata: suna, taga, blanka, media.**LUMO NEAKTINA.**

→LUMO SEKURA

LUMO POLARIZITA (M,950). L. kies radioj propagiĝas kun transversaj vibroj laŭ unu difinita ebena. (laŭ PIV,843)**LUMO PUNKTOFORMA.** ☒ L. eligita el eta fonto.**LUMO REFLEKTITA.** L. resendata de objekto k efika sur normalaj lumomezuriloj k/aŭ enfotilaj eksponometroj.**LUMO SEKURA.** L. kiu ne efikas kun →SENTIVMATERIALO.
→SEKURIGLUMIGILO**LUMO TANĜA** (M,1030). L. direkta al objekto, ĝin tuŝetanta.**LUMRADIOJ.** Elektromagnetaj radiadoj elirantaj el lumanta korpo, kiuj disvastiĝas rekte laŭ malsamaj ondolongoj k estigas videblan k nevideblan lumon.**LUMŜIRMILO** (M,888). Akcesorajo, aĉmetebla al objektivo, por protekti de sunradioj ĝian antaŭan lenson.**M.** Simbolo de sinkronigo por →FULMILO AMPOLA.**MAGAZENO.** ☒ Ŝanĝebla k lumbaranta ŝargilujo por filmfolioj k bendoj, ĉe apartaj aparatoj: →OPTIKA STABLO, →FOTILO ATELIERA k →F. PROFESIA.**MAGNETA SUBPORTILO.**Bendo aŭ disko, kovrita per feromagnetaj materialo, por rekta aŭ nereakta registrado de bildoj.
→CANON ION**MAKROFOTO** (M,770). Rezulto de →MAKROFOTOGRAFIO.**MAKROFOTO-BALGO.** ☒ Akcesorajo por makrofotado lok ebala inter fotilkorpo k objektivo, ebliganta senfinajn rajŝojn de pligrandigo per milimetra regulado.**MAKROFOTOGRAFIO.** Speco de fotografio ebliganta akiri proporcion 1:1 sur filmo pere de aparta ekipaĵo k sen uzado de mikroskopo.

MAKROFOTO-TUBO. ☒ Diverslonga alajo inter fotilkorpo k objektivo por makrofotadi; pli simple manipulebla ol baigo, ĝi tamen limiĝas je fiksitaj pli-grandigoj.

MAKRO-OBJEKTIVO. O. specife korekta por doni optimuman difinon dum fotado de tre proksimaj objektoj.

MALBRILA, Printpapero. Apart-speca surfaco de →PRINTPAPER.

MALCENTRADO (PIV,139). Delokado de objektivo, konservante la perpendikularecon inter la optika akso k la filmebena, por modifi kadradon.

MALDENSIGILO. Kemiaĵo, malpliiganta la →DENSECO-n de jam rivelita bildo.

MALFERM-OBO.** Fotadtekniko por eksponi filmon al lumo de fulmilo mane ekfunkciigita, post malfermo de B-poza obturatoro.

MALFRUIGILO. ☒ Rivelkemiaĵo evitanta aŭ malfruiganta la agadon de rivelaganto ĉe neeksponitaj →HALOGENIDOJ.

MALLUMĈAMBRO. Aparta malluma ejo, kie efektiviĝas traktado de ĉiuspeca sentivmaterialo. →FOTOGRAFIA LABOREJO

MALLUMĈAMBRA LAMPO (EB, 112/18). →SEKURIGLUMIGILO

MANA KOREKTILO. Mekanismo, kiu ebligas interveni, ĉe iuj aŭtomataj aŭ programitaj fotiloj, en la eksponmezurado kalkulita de la fotilo mem.

MASKO (EB,112/22). Nigra kartonfolio, specife traborita, por akiri randefektojn dum →PLIGRANDIGADO.

MASKO-KADRO (EB,112/34). Aparato uzata dum pligrandigado por platigo de printpapero k marĝenigo de bildo.

MEKANIKA EKSPONILO. ☒ Mekanismo, kiu ebligas funkcion de obturilo kiam la pila elĉerpiĝas, ĉe kelkaj aŭtomataj fotiloj.

MEMPORTRETO (M,177). Fotaĵo de la fotisto mem, kiun ebligas la →EKSPONPROKRASTILO.

MEZFORMATA REFLEKTO-FOTILO. Fotilo utiliganta filmon je →FORMATO MEZA.
→REFLEKTO-FOTILO

MEZURADO FOKUSEBENA. Sistemo por kalkuli la ekspondaŭron ĉe →FOTILO TTL.

MEZURADO SELEKT-ANGULA. Kalkulado de la ekspondaŭro laŭ tre selektiva angulo.
→EKSPONOMETRO SELEKT-ANGULA

MEZURCILINDRO (EB,112/35). Vitra, gradigita ujo por preparado de procedbanoj por sentivmaterialoj.

MIKROFILMADO. Reduktado de arkivotaj dokumentoj sur filmo. (laŭ PIV,695)

MIKROFILMO (M,807). Fotofilmo kun serio da etaj fotoj, specife pri dokumentoj, legeblaj poste per pligrandiga aparato. (laŭ PIV,695)

MIKROFOTOGRAFIO (M,807). Fotado de ege malgrandaj objektoj tra mikroskopo.

MIKROPRISMOJ. ☒ Etaj optikaj kristaloj piramidoformaj utiligitaj ĉe la ekranoj de la celiloj de reflekt-fotiloj por havigi pli precizan enfokusigon.

MIKROSKOPA ADAPTILO. Alaĵo por fotadi tra mikroskopo.

MIREDO** [Akronimo de angla esprimo: *Micro-Reciprocal-Degrees* = mikroreciprokaj gradoj]. Valoro de rajŝo inter 1.000.000 k → KOLORTEMPERATURO laŭ °K (5.000°K = 200 miredoj)

MISLUMO. ☒ Enfotile nekontrol-ebla lumo, ĝenanta eksponadon de fotofilmo.

MOLIGAGANTO. Surfacstreĉiga substanco, kiu kunhelpas la agadon de bazaj solvaĵoj k faciligas elsekiĝon.

MOMENT. Sistema de →TUJFOTOGRAFIO, planita en iama Sovetunio sen sekva disvastigo. →POLAROIDO

MOMENTFOTO (M,720). F. estigita per mallonga ekspondaŭro (malpli ol 1/20 de sekundo).

MONORIVELILO. ☒ Kemiaĵo, kiu samtempe rivelas k fiksas filmon, cele al rapida traktado. →RIVELILO

MONTRO-EKRANETO. Eta fenestro ĉe →FOTILO AŬTOMATA, kie aperas kontrolindikoj de pluraj funkcioj.

MOTOR-FOKUSIGO. ☒ Enfokusiga sistemo pere de motorizita aparato.

MOTORO. Mekanismo enkorpigita ene de modernaj aŭtomataj fotiloj ebliganta ŝargadon, en- k re-volvadon de filmo, aranĝon de la obturilo, krom efektivigi fot- aĵojn eĉ laŭ rapideco po 4-5 filmobildoj sekunde. Iama alaĵo angle nomata *Winder*. →REBOBENADO, →VOLVBUTONO

MOVEBLAJ ALETOJ. Metalaj lamenoj, antaŭmetitaj cirkaŭ →SPOTO, por reguli la vastecon de la lumfasko.

MTF [Akronimo de: *Modulation Transfer Function* = funkcio de transdona modulado]. Mezurado de difinkapablo en optika sistemo.

MULTIGRADE. Patentnomo de →PRINT-PAPERO KONTRASTO-VARIANTA.

MULTIPLIKANTO DE FOKUSA LONGO. Optika akcesoraĵo, metota inter objektivo k fotilkorpo, por pliligi la fokuson longon de la objektivo.

MUTA NATURO (PIV,728-Kabe). Fotado de diversaj aĵoj.

MUTNATURO-TABLO. ☒ T. ekipita per aparta →KONTINUA FONODIAFANA; utiligata por fotado de aĵoj. →MUTA NATURO

ND = Neŭtra denseco. Nomo de diversgrade neŭtragriza filtrilo uzata por mildigi troan lumintenson.

NEGATIVO (PIV,731).
→FOTO-FILMO NEGATIVA

NEGATIVUJO. Kadro ĉe →PLUGRANDIGATORO, en kiu entenas →FOTO-FILMO NEGATIVA

NETECO (M,841). Kvalito de filmobildo aŭ foto, en kiu vidiĝas eĉ plej etaj detaloj.

NEŬTRA DENSECO. →ND

NEWTON-RINGOJ. Fenomeno kreita de interfero, kiam du similaj travideblaj surfacoj ne perfekte kuntuŝiĝas (ekz ĉe subvitraj diaoj aŭ pligrandigiloj).

NIGRA TOLO. ☒ Teksajpeco uzata de fotistoj ĉe profesiaj fotiloj por malebligi bildo-damaĝon sur smirga fokusekrano fare de lumo.

NODA PUNKTO (PIV,741) (M,843). Optika dateno fundamenta por difino de la →OPTIKA CENTRO ĉe plurlensa →OBJEKTIVO.

OBJEKTIVO (EB,111/10-14). Optika sistemo, konsistanta el pluraj lensoj k ebliganta optimuman reprodukon de objekto ĉe →EBENO FOKUSA.

OBJEKTIVO AKROMATA. O. korektita pri la aberacio, kiun kaŭzas la kolora disperso. (PIV,23)

OBJEKTIVO ANAMORFOZA (PIV,44). Optika sistemo, kiu konsistas el cilindra lenso, taŭga por kunpremi bildon, sekve restarigitan dum projekciado pere de identa objektivo.

OBJEKTIVO ANASTIGMATA (PIV,45). O. korektita pri astigmateco.

OBJEKTIVO APOKROMATA.** O. korektita, por precize enfokusigi sampunkte la lumradiojn de la tri primaraj koloroj.

OBJEKTIVO BALGA. ☒ Altdifina O. kiu fiksiĝas sur la speciala →MAKROFOTO-BALGO.

OBJEKTIVO-BAZO. Surfaco kie la objektivoj fiksiĝas; konektejo por la elektraj kontaktiloj ĉe aŭtomataj fotiloj, cele al kontrolo de eksponado.

OBJEKTIVO-EBENO. ☒ E. orta al →OPTIKA AKSO, koincidanta kun la →OPTIKA CENTRO de objektivo.

OBJEKTIVO FIŜOKULA.

→OBJEKTIVO ULTRAGRANGULA

OBJEKTIVO GRANDANGULA. O.

kies fotada angulo situas inter 60° k 150°; ĉe 35mm-a fotilo egalas al fokusaj longoj de 35 ĝis 15 mm.

OBJEKTIVO KATADIOP-TRIKA (PIV,497) (M,280). ☒

O. fokusprofunda de 500 ĝis 1000 mm, tre kompakta pro ĉeesto de speguloj inter la lensoj; sen →DIAFRAGMO.

OBJEKTIVO-KOVRILO. Plasta,
ronda fotilekipaĵo por ŝirmi la antaŭan lenson de objektivo.**OBJEKTIVO LONGFOKUSA. O.**

havanta fokuson longon pli grandan ol la diagonalon de la kovrota formato.

OBJEKTIVO MALCENTREBLA

(PIV,139). O. kiu ebligas perspektivan korektadon de nevertikalaj linioj, ankaŭ ĉe →FOTILO MALGRANDFORMATATA.

OBJEKTIVO MALLONGFOKUSA. O.

kies fokusa longo estas pli malgranda ol la diagonalon de la kovrota formato.

OBJEKTIVO MILDEFIKA. O.

kiu donas mildajn efektojn ĉe portreto pere de traboritaj diafragmaĵoj.

OBJEKTIVO NESFERA. ☒ O.

kunmetita kun →LENZO NESFERA, kiu havigas bildon pli bone difi-

nitan ĉerande, je maksimuma diafragma-aperturo.

OBJEKTIVO NORMALA. O.

kies fokusa longo egalas al la diagonalon de la filmobildo.

OBJEKTIVO PLIGRANDIGATORA. O.

specifa, ŝanĝebla laŭcele, ĉe →PLIGRANDIGATORO.

OBJEKTIVO PORTRETA.

→OBJEKTIVO MILDEFIKA

OBJEKTIVO SCIENCA. O.

ebliganta tre proksiman fotadon en medicina-sciencia kampo, pere de enkorpigita →FULMILO RINGOFORMA.

OBJEKTIVO SENFOKUSA. O.

optika sistemo sen →FOKUSA LONGO, almetota antaŭ objektivo por pliigo aŭ malpliigo de ĝia →FOTAD-ANGULO.

OBJEKTIVO SUPERGRANDANGULA. O.

speciale aranĝita por doni spacon al supreniĝo de l' spegulo ĉe →UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO.

OBJEKTIVO ŜANĜEBLA

(EB,111/25). O. facile anstataŭigebla per alia de malsama fokusa longo. Ĉe portebiaj fotiloj ĝi fiksiĝas pere de speciala →BLOKILO.

OBJEKTIVO ULTRAGRANGULA. O.

kun fotada angulo je 180° k plie.

OBJEKTIVO VARIFOKUSA.

→ZOM-OBJEKTIVO

- OBJEKTO.** Parto de realo elektita por fotado.
- OBTURATORO** (PIV,754). Mekanismo, kiun konsistigas aro da lamenetoj, baranta la lumiradon al filmo. Ĝi povas esti centra, kurtena (→**KURTEN-OBTURATORO**), mekanika aŭ elektronika, funkciaanta permane aŭ aŭtomate.
- OBTURATORO CENTRA.** O. ene de objektivo inter la lens-grupoj.
- OBTURILO** (EB,111/44).
→**OBTURATORO**
- OKULARIA KURTENO.** Aparato por fermi la okularion dum fotado per →**EKSPON-PROKRAS TILO** ĉe →**REFLEKTO-FOTILO**.
- OKULARIO.** Optike farita lenso, kiu direktas al la okulo la radiojn pasintajn tra la tuta optika instrumento. (PIV,761)
- OMBRO.** Gravtone, la plej malhela parto de kadrado.
- OMBRO APERTA.** Areo en ombro ĉe →**EKSTEREJO**.
- ONDOLONGO** (PIV,649). Distanco, kiun trairas lum-ondo dum unu periodo. La videbla lum-ono havas O.-jn inter 4000 Å (viola) k 7000 Å (ruĝa).
- OPTIKA AKSO.** Imagaj rekta linioj: tra iranta la centro de lenso aŭ optika sistemo.
- OPTIKA CENTRO.** Centro de lenso aŭ objektivo, kiun trairas la →**OPTIKA AKSO**.
- OPTIKA PAPERIO.** Speciala papero, surface traktita, por purigo de →**OBJEKTIVO** aŭ →**LENZO**.
- OPTIKA STABLO.** Fotoaparato utiliganta grandformatajn filmfoliojn profesi- k industri- cele.
- OPTIKA VITRO.** Vitro kun apartaj ecoj, taŭga por fabrikado de lensoj, prismoj, speguloj ks.
- PANORAMA DIAO**.** Bildo diapozitiva grand-dimensia, retrolumigita, utiligebla por dekoro aŭ reklamo.
- PANORAMA KAPO.** Supra aparato de →**TRIGAMBA STATIVO**, kie fiksiĝas fotilo; ebligas ĝin movi k eĉ →**PANORAMUMI**.
- PANORAMUMI**.** Akiri specialan efektan sekvante movigantan objekton per fotilo, kiu rotacias laŭ vertikala akso, k ĝin fotante je longdaŭra ekspozado (1/15 de sekundo).
- PASPARTUO** (PIV,798). Papera kadro por enteno de diversformataj fotoĵoj.
- PEJZAĜO.** Kampo de fotografio pri plenaeraj scenoj, ĝenerale scienco- aŭ priskribo- cele.
- PENDIGA PINĈILO** (EB,112/6). Helpilo por pendigi filmon dum sekigado.

PENIKO ANTISTATIKA. P. kapabla forigi la statikan elektron el izola materialo, kun konsekvenca maladheron de polvoj al fotofilmo; utila precipe dum →**PLIGRANDIGADO**.

PENTAPRISMO. ☒ Ilo el optika vitro, kiu rektigas bildon sur la smirga fokusekrano, ĉe →**UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO**.

PERSPEKTIVO. Proporcio de grandeco inter la bildebenaĵoj, kiu ŝanĝiĝas dum fotado, per objektivoj diversfokusaj, de objekto, kies dimensioj restas egalaj ĉe la fina bildo.

PF. →**MOTOR-FOKUSIGO**

pH. Negativa logaritmo de la kiomeco da hidrogenjonoj en unu litro de la koncerna solvaĵo. (PIV, 821)

PILO. Fonto de elektra energio, uzanta la transformiĝon de kemia energio (PIV, 824); ĝi subtenas la elektrocirkvitojn ĉe →**FOTILO AŬTOMATA**.

PILO-TESTO. Indikilo pri ŝargostato de la piloĵoj ĉe →**FOTILO AŬTOMATA**.

PINĈTENILO (EB,112/38). Ilo por manipulado de printpapero dum rivelado.

PLASTA MATERIALO. Subportilo de fotografiaj emulsioj.
→**CELULOIDO**

PLIDENSIGILO. ☒ Solvaĵo uzata dum →**PLIFORTIGADO**.

PLIFORTIGADO. Pliigo de ĝenerala →**DENSECO** aŭ →**KONTRASTO** de bildo.

PLIGRANDIGADO. Pliigi dimensiojn de printaĵo per →**PLIGRANDIGATORO**.

PLIGRANDIGA EKSPONOMETRO. Aparta E. por eltrovo de la ekzakta →**EKSPON-DAŬRO** dum pligrandigo.

PLIGRANDIGAĴO.
→**PLIGRANDIGITA FOTO**

PLIGRANDIGATORO. ☒ Projekcia printaparato de fotografia laborejo por pligrandigo de filmobildoj.

PLIGRANDIGILO.
→**PLIGRANDIGATORO**.

PLIGRANDIG-INDICO. ☒ Nombro montranta proporcion de pligrandigo inter printaĵo k originata negativo: pligrandig-indico 10 = 10-oble.

PLIGRANDIGITA FOTO (EB,112/51). F. pligrandigita pere de taŭga aparato.
→**PLIGRANDIGATORO**

PLISENTIVIGO. lama traktado en →**MALLUMĈAMBRO** de B/N filmo, por pliigi ĝian sentivon per sekva longdaŭra ekspono al verda sekurlumo. Tute neutila nuntempe pro la altgrada sentiveco de filmoj.

PLUREKSPONADO. Intenca ekspozado de sama filmobildo, du- aŭ plur-foje, por realigi kreivajn bildojn aŭ fotoartifikaĵojn. → **SURMETITAJ BILDOJ**

PLURFULMILOJ. Aparataro de fulmiloj por lumigi grandajn ejojn aŭ areojn. → **FULMILSERVO.**

PLURTEGADO. Plurtavola → **TEGADO** de lenso.

POLARIZILO. ☒ Filtrilo, kiu forigas lumreflektojn el metalaj surfacoj.

POLAROIDO. Fotoaparato, kiu, per utiligo de → **TUJRIVELADO**, ebligas ricevi, en malpli ol unu minuto, senperan pozitivan bildon, B/N-n aŭ koloran. (laŭ PIV,843)

PONTO-FOTILO. ☒ [el la angla: *BRIDGE-KAMERA*] Fotoaparato, karakterizita per ecoj inter → **FOTILO KOMPAKTA** k → **REFLEKTO-FOTILO**, kun ĉiuj nunaj aŭtomatoj k → **ZOM-OBJEKTIVO** ne forigebla.

POSTERIZO.** Apartigo de tonoj en B/N foto.

POZITIVA. Karakterizo de bildo, kies B/N-j aŭ koloraj tonoj resp. respondas al tiuj de la reproduktita objekto. (laŭ PIV,857)

PREMBUTONO EKSPON-EKVI-LIBRIGA. Ilo permesanta modifon de → **EKSPON-DAŬRO** ĉe → **FOTILO AŬTOMATA.**

PREMBUTONO FILMREBO-BENIGA. Regilo de l' motoro revolvanta filmon ĉe → **FOTILO AŬTOMATA.**

PREMBUTONO MALBLOKANTA. B. permesanta la elprenon de → **OBJEKTIVO ŜANĜEBLA.**

PREMILO. Aleto por fiksteni foto-filmon en → **NEGATIVUJO** ĉe → **PLIGRANDIGATORO.**

PREMOPLATO. P. kiu premetendas filmon sur fokusebena ene de fotilo.

PRIMARAJ, Koloroj. → **KOLOROJ PRIMARAJ**

PRINTADO. Efektivigo de pozitiva bildo sur printpapero. → **PRINTAJO**

PRINTAJO. Bildo sur impresigema surfaco, ekspozita al lumo tra → **NEGATIVO** aŭ → **DIAPOZITIVO** pere de → **KONTAKT-PRINTADO** aŭ → **PLIGRANDIGADO.** (laŭ PIV/s,34)

PRINTAPARATO (PIV/s,34). Elektra aparato por → **KONTAKT-PRINTADO.**

PRINTILO. → **PRINTAPARATO**

PRINTKADRO (PIV/s,34). → **KOPIKADRO**

PRINTPAPERO (EB,112/24). Celiuloza → **SUBPORTILO**, kovrita de → **FOTO-EMULSIO**, uzata por efektivigi la pozitivan printon

de B/N aŭ kolora fotoĵo; ĝia surfaco povas aspekti: bril-ega, brila, duonmalbrila, malbrila laŭ la celotaj rezultoj.

PRINTPAPERĜO BARITA. P. tre sentiva por B/N-j pligrandigaĵoj, ŝmirita per barisulfata tavolo.

PRINTPAPERĜO BROMIDA. P. B/N tre sentiva, specifa por pligrandigaĵoj, estiganta tre puran nigran.

PRINTPAPERĜO KLOBROMIDA. P. B/N produktanta varmtonajn bildojn.

PRINTPAPERĜO KONTRASTO-VARIANTA. P. B/N, kies kontrasto varias laŭ la koloro de la impresanta lumo.

PRINTPAPERĜO POLITENATA. P. surdorse ŝmirita per polimera rezino, kiu adsorbas malpli da akvo, tiel plirapidigante la finan lavadon.

PRINTPROVO. Kontaktprintado de negativa filmo por taksii la kvaliton de la pozitiva bildo.

PROGRAMO. Ekspozitaĵo por fotiloj fabrike programita, havanta antaŭfiksitaĵojn duopojn ekspozitaĵo/diafragmo.

PROJEKCILO POR DIAPOZITIVOJ (EB, 112/55).
→ DIA-PROJEKCILO

PSEŬDO-SUNPLENIGO.** Ekspozitaĵo de printpapero al

blanka lumo dum rivelado; ĝi estigas malajn tonojn ĉe blankaj areoj de bildo.

PUMPO-PENIKO. Ilo por purigi fotofilmon, samtempe foriganta polverojn.

PURPuro. Unu el la → KOLOROJ KOMPLEMENTAJ, kies tono situas inter blua kaj ruĝa.

RANDEVENADO. ☒ Stompiĝo ĉe bildorandoj pro misfunkcio de objektivo aŭ uzo de maltaŭga → LUMŜIRMILĜO.

RANDEVANĜILO (EB, 111/42). Aparato por egaligi la randojn de fotoprintaĵo.

RAPIDFIKSAĜO. Kemiaĵo, kiu tuj stopas la agadon de nivel-solvaĵo.

RAPORTISTIKĜO.** Specifa sektoro de fotografio rilata al fotado de aktualaj bildoj, gazetar-serve.

REBOVENADO. ☒ Nepre agado antaŭ malfermo de la fotila → dorso por forpreni ekspozitaĵon; efektigebla mane aŭ motore.

RECIPROKECA DIFEKTO. Malpliĝo de sentivo okaze de ekspozitaĵo ege longdaŭra aŭ tre mallonga, kiu postulas pluan ekspozitaĵon.

REDUKTAGANTO.
→ RIVELAGANTO

REFLEKTA EBENO. Ĉiu surfaco direktanta la lampolumon al objekto.

REFLEKTA LUMJETILO (EB,112/60). → LUMJETILO REFLEKTA

REFLEKTA PANELO. ☒ Hela surfaco, sufiĉe granda, kapabla reflekti la lumon al objekto.

REFLEKTO-FOTILO. ☒ F. kiu ebligas kadraron de objekto pere de spegulo. → DUOKULA REFLEKTO-FOTILO, → UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO

REFRAKTO. Fizika fenomeno per kiu radio, traŭranta du malsame densajn mediojn, devias de sia propra rekta propaga linio. (PIV,908)

REGENERILO (M,1068). Rivelaganta solvaĵo aldonenda al aparta rivelilo por konstante konservi ĝian povon.

REKTA LUMJETILO (EB,112/59). Inkandeska lampo utiligata por rekte lumigi la fototan objekton.

REKTA MEZURADO. Ekspozmezurado ĉe → EKSPONOMETRO ENFOTILA, kiu baziĝas sur lumo reflektita de la filmo mem dum ekspozado; uzata ankaŭ por → FULMILO.

REKTIGO. ☒ Procedo por korekti la tro konverĝajn vertikalajn perspektivliniojn de bildo. → PERSPEKTIVO

REPRODUKTO-PROPORCIO. ☒ Rejŝo inter grandeco de objekto k ties bildo sur fotofilmo.

REPRODUKTO-STATIVO. Surkolona aparato regulebla por reproduktado de dokumentoj, desegnoj, fotoĵoj, ktp.

RETIKULIĜO. ☒ Fotoemulsia difektiĝo kaŭze de subita temperaturo ŝanĝo dum rivelado.

RETUŜO (PIV,922). Korekta interveno ĉe → PRINTAĴO.

RIVELADHALTIGENZO** (EB,112/2). → HALTIGENZO

RIVELADO. Kemia procedo por la redukto al nigra metala arĝento de la arĝentaj → HALOGENIDOJ, estantaj en foto-filmo

RIVELAGANTO. Kemia ingredienco de → RIVELILO, kiu funkcias kiel reduktanto.

RIVELATORO.** Aŭtomata sistemo por plena traktado de foto-filmoj, specife koloraj.

RIVELILO (M,1092). Unua solvaĵo dum rivel-traktado de → SENTIVMATERIALO.

RIVELKUVO (EB,112/1). Ujo por la → RIVELILO dum rivelprocedo.

RULPREMILO (EB,112/37). Gumarulo por premi printpaperon sur la plato de → GLACEGILO.

SABATTIER-EFEKTO.
→ PSEŬDOSUNPLENIGO

SEKA ALMETADO. Metodo por meti printaĵon sur subportilon pere de speciala termo-adhera teksaĵo.

SEKIGADO. Fina procedo dum la riveltraktado de sentivmaterialo.

SEKIGA ŜRANKO (EB,112/5). Uĵo, kie la filmoj sekigaŝas pere de varmega aero.

SEKUNDARAJ, Koloroj.
→KOLOROJ KOMPLEMENTAJ

SEKURIGFILTRILO. Lumfiltra ŝirmilo de →SEKURIGLUMIGILO.

SEKURIGLUMIGILO. ☒ Lampo kun ŝanĝeblaj filtriloj por →MALLUMĈAMBRO.
→LUMO SEKURA

SELENO. Kemia elemento ĉe lumĉeloj, kiu - se lumigita - estigas minimuman kurenton.

SENLUMA KAMERO (PIV,474) (M,253). Speciala aparato, kiu entenas filmon, por fotografi. (laŭ PIV,311)
→FOTILO

SENSORO (M,1186). Elektronika aparato, kiu taksas fizikan grandon k ties aliigojn.

SENTIVECO (PIV,976). Divers-grada impresiĝemo de sentivmaterialoj, proporcie al dimensioj de halogenidaj →GRANULOJ estantaj en →EMULSIO.
→FOTO-FILMO, →SENTIVOMETRIKO

SENTIVECO ALTA. S. de altgrade impresiĝemaj filmoj, laŭ gradeco deponit 24 DIN = 200 ASA/ISO.

SENTIVECO MALALTA. S. de filmoj malpli impresiĝemaj kun gradeco de 18 DIN = 50 ASA/ISO aŭ infre.

SENTIVECO MEZA. S. de normalaj filmbendoj ĝenerale uzataj, je gradeco de 21 DIN = 100 ASA/ISO.

SENTIVMATERIALO. Ĝenerale ĉiu substanco (→FOTO-FILMA FOLIO, →FOTO-FILMO, →PRINTPAPERO) lumsentema pro tavolo de halogenida emulsio.

SENTIVOMETRIKAJ SKALOJ. ☒ Por mezuri sentivecon de filmo, nome: ASA, DIN k ISO.

SENTIVOMETRIKO.** Mezurado de →SENTIVECO ĉe fotoemulsioj.
→SENTIVOMETRIKAJ SKALOJ

SIGNALHORLOĜO (EB,112/19). Horloĝo kun sonorilo por uzo en →MALLUMĈAMBRO.

SILICIO. La plej utiligata elemento en lumĉeloj.

SINKRONA DIAFRAGMA OBTURATORO (EB,111/44). Centra obturilmekanismo kun sinkronigo por fulmilo.

SINKRONA EKSPON-DAŬRO. ☒ La plej mallonga →EKSPON-

DAŬRO permesanta samtempan ekfunkcion de fulmilo (kutime 1/125 de sekundo).

SINKRONIGA KABLETO. K. kiu kunigas fulmilon kun specifa konektilo de fotoaparato.

SINKRONIGO. Kapablo de obturatoro ekfunkciigi fulmilon kiam ĝi maksimume malfermitas.

SKATOLFOTILO (EB,111/1). Ege simpla fotilo.

SLR [angla akronimo: *Single Lens Reflex*]. Siglo de →**UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO**

SMIRGA FOKUSEKRANO. Ekrano por aranĝi bildon ene de celilo k kontrolis ĝian netecon.

SOKLA FOTO-TENILO (EB,112/50). Fotujo kun bazo.

SPEGULO ĈEFA. S. ĉe →**REFLEKTO-FOTILO**, kiu direktas bildon al →**SMIRGA FOKUS-EKRANO**; movebla ĉe →**UNU-OKULA REFLEKTA FOTILO** k krome **duonreflekta** ĉe fotoaparato kun →**EKSPONOMETRO ENFOTILA** Ĝi nomiĝas ankaŭ **oblikva**.

SPEGULO OBLIKVA.
→**SPEGULO ĈEFA**

SPEGULO SEKUNDARA. S. kiu direktas la lumon iranta tra la duonreflekta →**SPEGULO ĈEFA** al eksponometra →**SENSORO** ĉe →**UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO** kun →**EKSPONOMETRO ENFOTILA**.

SPEGULREFLEKTILO (EB,112/52). Reflektilo de →**FULMILLO**.

SPORTO-FOTOGRAFIO. Faka kampo de fotografio cele al fotado de sportaj okazaĵoj.

SPOTO. Lumjetilo, lumiganta apartan malgrandan lokon. (PIV,1024)

STATIVGAMBO (EB,111/36). Pli-longigebla stango, parto de →**TRIGAMBA STATIVO**.

STATIVKAPO (EB,111/34). Plejsupra parto de →**TRIGAMBA STATIVO**, kie fiksiĝas fotilo, tiel poziciebla ajnmaniere pere de →**GLOBARTIKO**.

STATIVO (PIV,1030). Vertikala tripeđa portilo, faldebla, por fiksi lumilojn k aliajn aparatojn en ateliero.

STEREODIAPOZITIVO (EB,111/29). Bildo—duopo de la sama objekto farita per →**STEREOFOTILO** k poste rigardota per →**STEREOSKOPO**.

STEREOFOTILO (EB,111/27). Aparato, kiu, pere de du objektivoj, horizontale aranĝitaj je interokula distanco, fotas samtempe du bildojn (→**STEREODIAPOZITIVO**) de la objekto, kiuj pere de →**STEREOSKOPO** donas reliefpercepton.

STEREOSKOPIO (PIV,1032). Fotadmetodo per specifa →**STE-**

REOFOTILO, donanta reliefpercepton de objektoj.

STEREOSKOPO (PIV,1032). Instrumento por rigardado de →**STEREODIAPOZITIVO**.

STRATLUMIGADO. Lumo liverita per lumigiloj en stratoj, aleoj ks.

STREĈA PEZPINĈILO (EB,1127). Helpilo por streĉi filmon dum sekigado.

STROBOSKOPO. Optika aparato jetanta regule intermitajn lumbrilojn. (laŭ PIV,1039)

SUBAKVA GARDUJO. Hermetika ujo por fotiloj eltenanta pluratmosferan premon.

SUBEKSPONADO (M,1254). Nesufiĉa eksponado de fotofilmo pro tro fermita →**DIAFRAGMO** aŭ mallonga →**EKSPONDAŬRO**, estiganta feblan negativon aŭ malhelan diapozitivon.
→**SUPEREKSPONADO**

SUBPORTILO. Celuloza aŭ plasta materialo, sur kiu ŝmiritas sentiva emulsio.

SUBTRAHA KOLORSINTEZO. ☒ Procedo reproduktanta la kolorojn de objekto per surmetado de bildoj je →**KOLOROJ KOMPLEMENTAJ**, kiuj deprenas de la blanka lumino kvantojn da blua, verda k ruĝo.

SUNLUMA SPEKTRO. Kontinua vico de kolorstrioj pro disiĝo de sunlumo en ondolonge mal-

samaj radioj, sekve de refrakto tra optika prismo.

SUNPLENIGO^{**}. Fenomeno de nigriga malpliigo ĉe negativa bildo pro tro longa eksponado.

SUPEREKSPONADO. ☒ Fenomeno, per kiu estiĝas densa negativo aŭ tro hela pozitivo, laŭ la uzita filmo, kiam troa lumkvanto atingas foto-filmon pro ege malferrnita diafragmo aŭ longdaŭra eksponado.
→**SUBEKSPONADO**

SURBENDIGO. ☒ Procedo por reprodukti bildon sur magneta subportilo pere de elektronika aparato.

SURMETITAJ BILDOJ. Rezulto de plurfoja eksponado de sama →**FILMOBILDO**.

ŜARGADO. Antaŭenirigo de filmo k samtempa streĉo de →**OBTURATORO** per →**ŜARGLEVILO**.

ŜARGILO. Ujo por →**FOTO-FILMO MALGRANDFORMATA**. (laŭ PIV,1059)

ŜARGLEVILO. Fotilmekanismo, kiu antaŭenigas filmon k samtempe streĉas obturilon.

ŜIRMADO. ☒ Tekniko por malpliigi la eksponadon ĉe bildparto dum printado aŭ por selektive modifi negativon aŭ diapozitivon antaŭ printado.

ŜRAŬBA, Blokilo. Ŝraubingo surfronte de fotilo, kie fiksiĝas →**OBJEKTIVO ŜANĜEBLA**.

ŜRAŬBINGO (EB,111/32). Ingo ĉe
→BAZO-PLATO de fotilo, kiu ebligas ĝin fiksi al →TRIGAMBA STATIVO.

TABLO-STATIVO. Malgranda aparato por teni fotilon.
→TRIGAMBA STATIVO

TAGLUMA FILMO. →FOTO-FILMO
POR LUMO NATURA

TAGLUMO. →LUMO NATURA

TEGADO. ☒ Traktado de lensa surfaco per vaporigado de diversaj substancoj, kiu pliiigas la refrakto-indicon k plibonigas la transiradon de lumradioj.

TEKNIKAJ SPECIFOJ. Detala priskribo de la fotileroj; objektivo, ekspoz-daŭra gamo ktp.

TELEMETRO (PIV,465) (EB,111/40). Optika ilo por mezuri distancon inter objekto k fotilo.

TELEMETRO JE DISIGITA BILDO. ☒ Aparta telemetra sistemo per utiligo de →MIKRO-PRISMOJ ĉe →REFLEKTO-FOTILO.

TELEMETRO-LUKETOJ (EB,111/22). Antaŭaj aperturoj de la distanc-mezurilo kuplita kun enfokusigo, ĉe nerefleka fotilo.

TELEOBJKTIVO. O. por foti tre malproksimajn objektojn: fotada angulo inter 30° k 1°, fokusa longo inter 150 k 2000 mm (formato 24x36).

TELEREGILO (M,1337). Instrumento ebliganta ekfunkcion de

aliaj aparatoj de malproksime: **fotilobturatoro**, per elektromagnetaj ondoj aŭ transruĝaj radioj; **fulmilo** pere de ultrasonoj (→DE-PEND-LUMILO); **dia-projekciilo** per elektrokablo, ks.

TELESKOPA ADAPTILO. Alaĵo ebliganta astronomian fotadon per teleskopo.

TENBRAKETO (EB,111/56). Braketo por kunfiksi fulmilon kun la fotilo.

TERMOMETRO (PIV,465) (EB,112/23). Mezurilo por temperaturo, uzata ĉe riveladsolvaĵoj.

TERMOREGULA BENKO. Duvanda kuveto kun termokontroita akvo por certigi konstantan temperaturon de riveladsolvaĵoj.

T-GRANULO. ☒ Plata halogenida grajno, multe pli sentiva ol tiu kristalforma.

TLR [angle: *Twin-Lens Reflex* = duobjektiva reflektio-fotilo]. Siglo de →DUOKULA REFLEKTO-FOTILO

TONŜANĜIGO. ☒ Aliĝo de la koloro de fotografajo per kemia likvaĵo.

TRANSRUĜAJ, Lumradioj.
→INFRARUĜAJ, L.

TRANSVIOLAJ, Lumradioj.
→ULTRAVIOLAJ, L.

T-REGULADO. R. kiu permesas malfermon k fermon de obtura-

toro per du sinsekvaj premoj de la →EKSPON-BUTONO.

TRIGAMBA STATIVO (EB,111/31). Subtenilo por kino-fotografaj aparatoj, laŭaltece alĝustigebla. Ĝia movebleco ĉe →STATIVKAPO permesas taŭgan kadrorientigon. →TABLO-STATIVO

TROPIKUMIGO.** Taŭga protekto-sistemo de profesia fotilo kontraŭ pluvo, malsekeco k polvo. →FOTILO ĈIAVETERA

TRUDRIVELADO. Pliilongigo de riveladtempo pli ol la normala por korekti subeksponitan negativon aŭ pliigi la filmsentivon.

TTL [angla akronimo: *Through The Lens* = tra la objektivo]. Mezursistemo por lumradioj venantaj traobjektive el la objekto, ĉe fotoaparato kun →EKSPONOMETRO ENFOTILA.

TUBFOTILO (EB,111/18). →FOTILO
35 mm-A

TUJFOTAĴO.** Foto farita per specifa procedo.
→TUJRIVELADO

TUJFOTOGRAFIO.** Specifa rivelprocedo de →TUJRIVELADO uzata ĉe fotilo →POLAROIDO.

TUJRIVELADO.** Procedo donanta pozitivan paperkopion tuj post eksponado, per transigo ene de →FILM-PAKO, entenanta kerniaĵojn k paperon.
→POLAROIDO

ULTRAVIOLAJ, Lumradioj. (PIV, 1193). Elektromagnetaj radioj je ondolongo sub 3900 Å, neperceptebaj de homa okulo, sed registreblaj ĉe normala foto-filmo.

UNUA PLANO (M,930). La parto de objekto plej proksima al fotilo.

UNUGAMBA STATIVO. Subtenilo, kiun konsistigas ununura pliilongigebla stango, por fotilo aparte ekipita per →OBJEKTIVO LONGFOKUSA.

UNUOKULA REFLEKTO-FOTILO. ☒ F. en kiu →KADRADO eblas tra la objektivo mem.
→REFLEKTO-FOTILO, →SPEGULO ĈEFA

UV. Siglo de ultraviola filtrilo, uzata por fotado de pejzaĝoj, foriganta atmosferan vualon.

VARMA KONTAKTILO. Ingo sur la fotilkorpo, por rekte konekti fulmilon.

VIDILO. ☒ Aparato kun smirga vitro por ekzameni negativojn k diapozitivojn.

VOLETO.** Maldika movebla lameno, metala aŭ piasta, enŝovenda enen de →FILMPORTILO aŭ →MAGAZENO por protekti filmon post eksponado.

VOLVBUTONO (EB,111/4). Regilo por mane antaŭenirigi filmon.

VUALO. Nedezirata denseco aŭ vualita aspekto de negativo aŭ

